

juna amiko

februaro 2021 • n-ro 1/2021 (166)

ISSN 0230 1318




PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

△ Arbo-plantado en Herzberg.
Konversaciaj temoj: Travivaĵoj pro la kafotaso.
Interesa urbo en Barato: Ĉandigarao. *Elstaraj virinoj:*
Elizabeth Eidenbenz kaj Aoua Keïta. *Interkultura*
Mondo: Savu la Planedon kun Kungfua Kuniklito.
Teatro: La soleco de la formiko. *Laste:* Pandemia puzlo.

PILĈJO

Teksto: Héctor Quintero
Desegnistino: Sonmy Álvarez.
Tradukisto: José de Jesús Campos





Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4

Konversaciaj temoj:

Travivaĵoj pro la kafotaso (Judit Felszeghy, HU) 5



Nigra kanto: "Mi dankos" (Mireille Grosjean, CH) .. 9



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 10

Interesa urbo en Barato:



Ĉandigarh (Mireille Grosjean, CH) 11

Kantu kun Juna Amiko:

Kien vi iros?

(Małgosia Komarnicka, PL) 13



Elstaraj virinoj: Elizabeth Eidenbenz;

Aoua Keïta (Renée Triolle, FR) 14



LUDE, la unika dua etaĝo: Flugema kiel

vento (Mónika Molnár, CH) 17

Naturo: Arbo-plantado en Herzberg



(Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, DE); Ni savu nian domon, nian teron, nian mondon, nin (Małgosia Komarnicka, PL); 19



Legu librojn - premioj - konkursoj: Klubo de

bona libro: La Krubalo. Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo: Bavario. (Małgosia Komarnicka, PL) 22

Recenzo: Rakonto el la vikinga epoko *Arne la ĉefido* (Luiza Carol, IL) 29



Interkultura Mondo: Savu la Planedon kun Kungfua

Kunikleto! (Elena Nadikova, RU) 31

Legu kaj ordigu:

Kiel higieno manĝi (Mireille Grosjean, CH) ... 34



Kiom stultan ideon mi havis...

(Mireille Grosjean, CH) 35



Teatro: La soleco de la formiko.

(José de Jesús Campos Pacheco, CU) 36

Hundoj: Maria kaj ŝia mirinda helpohundo Violo (Raita Pyhälä, FI) 37



LASTE, la tria etaĝo: Pandemia puzzle (Stefan MacGill, NZ/HU) 38

Landaj Reprezentantoj - Perantoj de Juna Amiko ... 39

La 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021 40



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo:** Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj:** Ĉefaj informoj pri Juna Amiko: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 154 (1972 ĝis 2018) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net.

Redaktoro: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en majo 2021. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en t.n. A-landoj kaj €13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande €11, B-lande €7.

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

Kvankam la redakcio de *Juna Amiko* ne preskribas al aŭtoroj ĉeftemojn por la konkretaj numeroj, tamen okazas, spontanee, aŭ kaŭze de la aktuala monda situacio, ke nia revuo estas dediĉita al tre proksimaj, aŭ parencaj temoj.

La aŭtoroj kaj la rubrikestroj preparis por vi tre interesajn kaj motivigajn legaĵojn pri la naturo, ĝia defendado, ekologio, vivmedio, bestoj, arboj, eĉ ilia plantado, savo de nia planedo kaj la vivo sur ĝi... Nature ankaŭ pri la koronvira pandemio, kiu iom fermis pordojn de niaj domoj, en kiuj estas pli da tempo por legi, studi kaj lerni vivi pli sane kaj pli kvalite.

Kun *Juna Amiko* vi tamen denove povos amuziĝi (bildstrioj, la rubriko LUDE...), konatiĝi kun produktado de ceramikaĵoj, kolorigi bildojn kaj serĉi diferencojn inter ili (LUME), kanti kun brazila rokmuzikisto kaj kun usonaj nigruloj, aŭ dum la jam tradicia 9-a Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021 en Pollando.

Kvankam nuntempe ne eblas viziti forajn landojn kaj historiajn vizitindaĵojn, vi povos kun *Juna Amiko* naĝi per velŝipo kun afrikanoj al Ameriko, aŭ viziti tre interesan baratan, majstre dezajnititan urban Ĉandigaro.

Denove vi povos legi ankaŭ poemon, porinfanan libron, legendojn (nun bavarajn), recenzon pri libro el vikinga epoko, helpi savi nian planedon kaj protekti ĝin kun la nova Esperanto-projekto *Kungfua Kuniklito*. Kun pliaj *elstaraj virinoj* el Svislando kaj Afriko vi povos konatiĝi en la kutima samnoma rubriko.

Ne mankos la kutima “stulta ideo” de nia prezidantino kaj ŝia ordigado de Esperantaj tekstoj – kaj eĉ vizito de kuba teatraĵeto pri formiketo kaj liaj amikoj.

En la rubriko *Laste* vi povos solvi “pandemian puzlon”, – krucvortenigmon, kiu montros kelkajn solvojn kiel eliri el la tutmonda koronvira pandemio.

Agrablan legadon kaj eble tamen utilan devigan “restadon hejme” deziras al vi via redaktoro

Stano Marček

Karaj legantoj!

Ni ĉiuj klopodas progresi en la uzo de nia lingvo. Ni provas esti en kontakto kun la lingvo plej ofte, se eblas en ĉiu tago. Ni spertas diversajn strategiojn.

Ĉiu persono havas siajn preferitajn strategiojn; tio estas konata afero. Ĉu aŭskultante radion, kiel www.muzaiko.info, ĉu spektante filmetojn en *youtube*, ĉu parolante en loka klubo aŭ per iu reta rimedo, kiel skajpo aŭ *zoom*, ĉu verkante tekstojn, taglibron, artikolojn, ĉapitrojn por *Facebook*-paĝo... Tute certe unu strategio por progresi, kiu validas por ĉiuj, estas legado. Do por ILEI la




eldonado de la revuo *Juna Amiko* estas centra tasko por provizi vin per interesaj tekstoj, amuzaj rakontoj, ludoj, kantoj kaj kvizoj. ILEI ankaŭ subtenas morale kaj apogas la programon nomitan *Esperanto-Sumoo*, ĉar tiu lukto ebligas progreson per legado, tute klare. Tiu programo estis brile elpensita de nia kolego HORI Jasuo el Japanio. En tiu programo ĉiu luktas

kontraŭ si mem, por sukcesi legi la paĝojn promesitajn.

ILEI lanĉis la programon *Komuna legado okaze de la Tago de la Libro*, kaj kadre de ĝi ĉiuj legas la saman tekston, kiam alvenas la 15-a de decembro.

Do ek al legado!! Dum legado vi ne estas sola.

Mireille Grosjean,
prezidanto de ILEI



Travivaĵoj pro la kafotaso

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. La fatala akcidento

Karina (K) babilas kun sia edzo
Johano (J) en ilia loĝejo, iun
posttagmezon.

K – Mi estas senkonsila! Helpu min!

J – Vi ja aspektas malbonhumora! Kio okazis al vi?

K – Imagu, rompiĝis la kafotaso! Tiu, kun la ruĝaj punktoj.

J – Ĉu rompiĝis? Tasoj malofte rompas sin... Ĉu vi eble faligis ĝin?

K – Ho, ne. La hundo rompis ĝin.

J – Klare, la hundo ne povas lerte trinki el taso. Sed, kial vi donis vian preferatan kafotason al la hundo?

K – Ne primoku min, kara! Mi certe ne donis ĝin al li! Mi estis trinkanta tason da kafolakto ĉe la malalta tablo, sidanta en la brakseĝo. La hundo alvenis, kaj dum mi karesis lin, mi

metis la tason sur la tablon. Li vaste svingadis sian voston, kaj per la vosto li forpuŝis la tason de sur la tablo. Rigardu, jen la pecoj!

J – Hm... Tio estas jam verŝajne por la rubujo, kaj ne plu por kafolakto.

K – Ĉu ne eblas kunglui ilin?

J – Bedaŭrinde, ne eblas. Rigardu, tro multaj pecetoj, kaj ankaŭ ĝia tenilo rompiĝis. Eĉ se mi sukcese povus kunglui ilin, vi ne plu povas uzi la vazon por trinkado.

K – Ho, mi estas ege malĝoja! Mi ja ne havas tason, el kiu mi povu trinki kafolakton.

J – El tiu alia, kiun vi uzas por teo.

K – Ĝuste tial oni ne povas uzi ĝin por kafolakto!

J – Kiu ordonis tion?

K – Mi. Ĝi estas por teo. Kaj tiu ĉi – taso por kafolakto. Ĝusta mezuro por du decilitroj, ĝusta formo, ĝusta koloro; mi ne plu trovos tiel perfektan tason de kafo!

J – Kara mia, sed ni ja havas multajn ankoraŭ! Ne necesas aĉeti.

K – Pri kiu vi pensas?

J – Pri diversaj tasoj, kiujn ni havas. En la ŝranko estas la porcelana servico de mia avino. En la kuireja ŝranko staras kvar tute novaj vazoj, kiujn ni ricevis de via bofratino; krome ni havas violkoloran tasegon el fajenco, kaj estas eĉ kvar vitraj glasoj kun arĝentaj teniloj. Vi ja havas abundan elekton!

K – Jes, vere. Sed neniuj estas taŭga por mia matena kafolakto.





La servicon mi gardas por gastoj; la violkolora estas tro granda; tiuj de la bofratinoj estas tro altaj; la vitraj estas nepre por teo... Mi devas rigardi la vendejojn, kaj trovi ĝuste tian, kia rompiĝis!

II. Granda sortimento, sen solvo.


Karina (K) babilas kun sia edzo Johano (J) en ilia loĝejo, post tri semajnoj.

- K – Ho, fin-fine hejme! Lacega mi estas! Kara, helpu min prepari la vespermanĝon; jam estas malfrue!
- J – Vi alvenis pli malfrue ol kutime. Ĉu vi laboris? Ĉu vi butikumis?
- K – Jes, mi vizitis kelkajn butikojn de porcelanaĵoj, kaj mi multe marŝis. Mi vidis belegajn servicojn el porcelano. Ili estis ornamitaj per rozoj kaj papilioj, sed estis aliaj kun ruĝaj papavoj. En la servico estis tute malgrandaj kaj ankaŭ pli grandaj tasoj, subtasoj, krome du kruĉoj, kaj unu bovlo por sukero, mi pensas.
- J – Bonŝance, ke vi ne aĉetis la tuton!
- K – Tiuj servicoj kostas sufiĉe multe. En alia vendejo mi demandis, ĉu ili havas tason, ne tro malgrandan, ekzemple por kafolakto. La afabla vendistino montris al mi kelkajn diverskolorajn tasojn, kun diversaj ornamaĵoj. Sur unu estis ruĝa kokcinelo sur helverda fono, sur alia birdo en helblua fono; krome estis tasoj kun papilioj, ĝirafo, elefanto, urseto kaj vulpeto... Kaj...
- J – Kaj, kial vi ne aĉetis unu el tiaj?
- K – Ĉar mi volas tian, kia la antaŭa estis. Kun punktetoj. Mi eĉ interesiĝis pri tiaspeca vendejo, kaj mi pluiris ankaŭ al tiu tria vendejo.
- J – Kaj...?
- K – Mi plu rakontos tuj, sed unue bonvolu

verŝi por mi tason da teo, ĉar mi laciĝis pro la butikumado. En la tria vendejo estis tre multaj varoj. Tie estis ne nur porcelanaĵoj kaj vitraj glasoj, sed ankaŭ manĝilaroj, kuirpotoj, pletoj, kribriloj, ĉerpiloj, diversaj tranĉiloj... Cetere, mi pensis, ĉu vi eble ne deziras havi iun bonan tranĉilon? Ni povus kune viziti tiun vendejon, por ke vi elektu.

- J – Povas esti, eble, iam. Kaj ĉu tie vi trovis la ĝustan tason por kafolakto?
- K – Fakte, estis tie sufiĉe multaj vazoj kun punktetoj! Unulitra vazo por lakto, duonlitra kruĉo kun kovrilo, por kuiri kafon, kaj tasoj en diversaj grandeco kaj vasteco.
- J – Ĉu vi aĉetis tie la kafotason por vi?
- K – Tiun ne.
- J – Mi ne komprenas, kial do?
- K – Ĉar tiuj estis aŭ el fajenco, sed la plej multaj el metalo kun emajlo. Krome, ne estis tie blanka taso kun ruĝaj punktetoj. Mi tamen aĉetis tiun ĉi ruĝan ujon kun blankaj punktoj. Rigardu ĝin, en ĝi ni povas teni lakton.





- J – Bone... – Praktika ujo, metalo kun emajlo; ĝi ne estas facile rompiĝema. Sed, kion vi uzos por via kafolakto?
- K – Mi ne scias tion. Mi timas, ke mi ne povos trovi plaĉan tason por mi.

III. Solvo kun ĝojo kaj kontento.

Karina (K) babilas unue telefone kun iu mastro (M), poste kun sia edzo Johano (J) en ilia loĝejo, post unu semajno.

- K – Bonan tagon! Mi vidis en la lasta surloka revuo, inter la anoncoj, ke vi vendas diversajn tasojn.
- M – Bonan tagon! Ĝuste! Sed mi ne nur vendas, sed mi ankaŭ mem produktas kelkajn. Pri kiu vi interesiĝas? Vi povas alveni al mia butikoj, kaj ĉirkaŭrigardi ĉi tie!
- K – Dankon, tre volonte! Ĉu vi ankaŭ mem produktas tasojn?
- M – Jes, laŭ profesio mi estas tornisto, kaj nur mia kromlaboro estas vendisto.
- K – Pardonu, kio vi estas laŭprofesie?

M – Tornisto. Ceramikisto. Mi produktas per mia tornilo diversajn objektojn, vazojn por floroj kaj por vino, kruĉojn de akvo kun beko, tasojn de teo, de kafo, bovlojn, ankaŭ subtasojn.

K – Ege interese!

M – Ankaŭ tion vi povas rigardi! Mi havas specialan stablon, kiu turniĝas; ĝi estas la tornilo. Kaj sur ĝi estas peco da mola, malseka argilo, el kiu mi formas la diversajn objektojn. Ĉu vi ankoraŭ ne vidis iun tian?



- K – Bedaŭrinde, ne. Neniam.
- M – Do, mi volonte montros al vi, kiel mi produktas potojn.
- K – Mi venos postmorgaŭ, antaŭtagmeze, se tio konvenas por vi.
- M – Jes, kompreneble! Ĝis baldaŭ!

- J – Ho, mi vidas, ke vi jam aĉetis la belan, ĝustan tason por via kafolakto! Sed, ĉu ĝi ne estas iom pli malgranda, ol la antaŭa?
- K – Ne, ankaŭ tiu ĉi estas la sama, ankaŭ tiuj ĉi estas du decilitraj.
- J – Ĉu vi do aĉetis ne nur unu el tiaj tasoj?
- K – Jes. La mastro enpakis ses tasojn, sed li pagis nur kvar. Li montris al mi sian uzinon, la diversajn potojn, vazojn, tasojn. Li produktas ankaŭ telerojn kaj pletojn, eĉ malgrandajn skulptaĵojn.
- J – Mi supozas, ke tio tre plaĉis al vi!
- K – Ho, jes. Precipe la formado de potoj el argilo sur la turniĝanta stablo! Imagu, li permesis, ke mi provu tion. Unu mano faras trueton en la argilon, dum la alia daŭre glatigas la eksteran parton. Estas mirinde, kiel kreskas el la argilo la diversaj formoj!
- J – Do, ĉu vi eĉ mem produktis ion?
- K – Nur iomete. Sed... – mi eksentis entuziasmon por tiu profesio! Johano, ankaŭ mi deziras okupiĝi pri ceramikaĵoj, kaj mem produkti vazojn kaj tasojn!
- J – Tre bone, karulino! Jen estas jam ses kafotasoj, kaj se vi produktos eĉ pliajn, ni ne havos plu zorgojn.
- K – ???
- J – Vi povas trankvile trinki kafolakton ĉe la malalta tablo, kaj karesi dume nian hundon. Se la hundo forpuŝas la tasojn per sia vosto, ĉiam restos kafotasoj sufiĉaj por vi!





TASKOJ

I. Legu atente la tekston, trovu la nekonatajn vortojn. Poste respondu la sekvajn demandojn:

- Priskribu, kiel aspektis la taso, kiu rompiĝis!
- Rakontu, ĝenerale el kiu materialo estas la vazoj, potoj, glasoj ktp!
- Rakontu, kiujn vazojn vidis Karina en la diversaj vendejoj!
- Rakontu, kiujn pliajn ilojn vidis Karina en la vendejoj!
- Rakontu, kion produktas tornisto (ceramikisto)!
- Rakontu, kiuj vazoj, potoj, tasoj ktp. troveblas en via kuirejo, kaj difinu, kiom grandaj ili estas!

II. Starigu po sep diversajn demandojn (kun diversaj demando-pronomoj, sed ne per "ĉu") pri la tri dialogoj! Poste via partnero, aŭ vi mem respondu ilin!

- Rakontu la enhavon de la diversaj dialogoj!
- Faru (buŝe aŭ skribe) dialogon, inter vendistino kaj Karina, en iu vendejo pri porcelanaĵoj aŭ/kaj kuirejaj potoj!
- Faru (buŝe aŭ skribe) dialogon inter tornisto/ceramikisto kaj Karina!

III. Skribu leteron – en la nomo de Karina – en kiu vi rakontas, kiel rompiĝis la taso!

- Verku reklam-anoncon pri produktaĵoj de tornisto/ceramikisto! (Ne forgesu pri la grandeco de la varoj!)
- Skribu leteron, en kiu vi rakontas, ke vi vizitis torniston, ĉu plaĉis al vi ties laboro kaj kial, kun kiu decido, opinio naskiĝis en vi, post tiu vizito! Ne forgesu pri la formalajoj de la letero!

Vortklarigoj

Kafolakto: trinkaĵo el lakto kaj iom da kafo.

Servico: tuto de vazoj por manĝoj (vidu la bildon sur la paĝo 6).

Pleto: vasta, malalta ujo el metalo, el ligno ktp, en kiu oni povas baki en forno.

Kribrilo: kuireja ilo, por disigi malsamajn materialojn, ekz. terpomon de akvo.

Ĉerpilo: kulerego, per kiu oni povas elpreni manĝaĵon.

Fajenco: materialo el bakita argilo, el kiu oni faras vazojn, tasojn ktp.

Kruĉo: vazo kun beko kaj tenilo, el kiu oni povas verŝi. Sur la suba bildo, sur la bretoj, estas diversaj kruĉoj.

Emajlo: vitrosimila materialo, per kiu oni kovras ĉefe metalajn ujojn kaj vazojn.

Tornilo: turniĝanta malgranda tablo, sur kiu oni povas formi diversajn objektojn, ekz. el argilo (vidu la suban bildon).

Tornisto: homo, kiu faras diversajn potojn kaj objektojn, ĉefe el argilo (vidu la suban bildon).





Mireille Grosjean

“Mi dankos”

La ŝipo luktis kontraŭ altaj ondoj.
La vento estis fortega. La nuboj
kovris la lunon, ĉio nigris ĉirkaŭ la
ŝipo, la ĉielo nigris, la akvo nigris.

Ĉiuj timis, timegis. Sur la ferdeko de
la velŝipo staris la kapitano.
(Ĝi ne estis motorŝipo, nek ŝipo
kun vapormaŝino, sed bela granda velŝipo
kun tri mastoj; la ŝtormo okazis en la jaro
1772). La kapitano Newton venis al la ideo,
ke ĉiuj baldaŭ dronos kaj mortos. Ĉiuj,
jes, ne nur li kaj liaj maristoj, sed multaj
nigruloj en la suba ferdeko, kiujn li portis
al Ameriko por vendi ilin kiel sklavojn.
Do li perdis sian monfonton. Tiam li
komencis preĝi; li promesis al Dio, ke
okaze de savado, okaze de ne-dronado, li
faros ion grandan por la gloro de Dio.

La maro kvietigis kaj la ŝipo atingis
Amerikon. Tie li vendis la afrikanojn. Tion
li kutimis fari. Tamen post tiu aventuro lia
penso evoluis kaj li ŝanĝis sian sintenon
al aliaj homoj. Por danki al Dio li kreis
kanton je la gloro de Dio: *Amazing Grace*.

Tiu kanto fariĝis tre fama ĉe nigruloj en
Usono, temas pri *negro spiritual*, kantita
en multaj gravaj eventoj de la ŝtato Usono,
kiel la enoficigo de la nova prezidento Joe
Biden la 20-an de januaro 2021:

Amazing Grace.

John Newton. McIntosh. C. M. Arr. by E. O. Excell.

C D E F G A H C D E F G A H C D E F G A H



Mirinda Grac'! Ho, dolĉa son'!
Eĉ min elsavis ĝi.
Mi estis stulta kiel ŝton',
Sed ĉion vidas mi.

Instruis grac' al mia kor'
kaj timon pelis ĝi.
Superbis grac', la Di-favor',
kaj kredon trovis mi.

Danĝeroj, zorgoj kaj sufer'
senĉese trafis min,
sed graco ĉiam je mister'
per gvido savis min.

Promesis bonon la Sinjor'
al mi per sia vort'.
Li estos ŝild' dum tuta hor'
tra l' vivo ĝis la mort'.

Ĉu vi demandas, kial nigruloj alprenis
tiun kanton kaj kantas ĝin tiom arde, eĉ se
ĝia kreinto estis sklavo-komercisto? Jen la
respondo: se vi komencas ludi la melodion,
uzante kiel la unuan noton C-dieso sur
piano, vi povas ludi la tutan melodion,
uzante nur **nigrajn** klavojn...



Alekso Miller kantas la kanton *Mirinda
Grac'* en Esperanto: https://tubaro.aperu.net/v/ytb_iVJ89FwqVY4/

El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, plantojn, birdojn kaj homojn! Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestaĵojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, plantoj, birdoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo? Kio plia estas en la naturo?

Mireille Grosjean

Ĉandigarh

Barata urbo, mastroplanita de la svisa arkitekto Le Corbusier.

En 1947 okazis sendependiĝo de Barato, konata ankaŭ kiel Hindio aŭ Hinda Unio. Plie la hinduistoj kaj islamanoj ne plu volis vivi kune; do la islamanoj fondis en okcidento kaj en oriento de Barato novan ŝtaton Pakistano (Orienta kaj Okcidenta).

Tiu modifo de teritorio faris, ke la barataj ŝtatoj Pengabo kaj Harjano ne plu havis ĉefurbon. Do naskiĝis bezono krei novan urbon. Jen Ĉandigarh. En 1971 la Orienta Pakistano sendependiĝis kaj prenis la nomon Bangladeŝo.

Kreita en 1966, la novurbo Ĉandigarh nombras nun pli ol milionon da loĝantoj.

La svisa arkitekto Le Corbusier (1887-1965), kies denaska nomo estis Charles-Edouard Jeanneret, el La Chaux-de-Fonds, dezajnis la mastroplanon de la urbo, la emblemon de la urbo kaj la aspekton de diversaj konstruaĵoj en ĝi. Al la planado kontribuis ankaŭ lia kuzo Pierre



Parko de Ĉandigarh.



Jeanneret kaj arkitektino barata: Eulie Chowdhury.

La koncepto estis originala: la urbo konsistas el 60 sektoroj.

Gravaj establoj, kiel vendejoj, lernejoj, sportejoj, preĝejoj kaj parkoj ekzistas en ĉiu sektoro.

Oni povas paŝi tra la tuta urbo, promenante tra la parkoj kaj ĝardenoj.

En la jaro 2016 Unesko kreis tutmondan kulturen

heredaĵon, kies nomo estas *“La Arkitektura kaj Urboplanada Verko de Le Corbusier, Elstara Kontribuado al la Moderna Movado”*, arigante 17 konstruitajn projektojn en jenaj 7 landoj: Germanio, Argentino, Belgio,

Francio, Japanio, Barato kaj Svislando.



Palaco de Asembleo en Ĉandigarh.



Supera Kortumo de Justeco, Ĉandigarh.



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Gi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj kantante samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Pasintjare okazis jam la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Ĝi okazis rete kaj danke al tio partoprenis en ĝi pli da esperantistoj el diversaj landoj de la mondo.

Mi proponas unu el la premiitaj kantoj. Ĝi estas la kanto *Kien vi iros?*, kiun kantis Rafael Milhomem el Brazilo. Li ankaŭ skribis la vortojn kaj komponis la muzikon al tiu kanto. La kanto ricevis ankaŭ specialan premion pro la muzika akompanado, kune kun la kanto *Jaro de l' viruso* de I.D.C. el Francio. La kanto *Kien vi iros?* estis ankaŭ elektita de polaj ĵurnalistoj (neesperantistoj) el kvin senditaj kantoj kaj la 15-an de decembro 2020 polaj aŭskultantoj havis la eblecon aŭskulti ĝin en la pola nacia radio "Trójka".

Rafael Milhomem estas muzikisto (Plur-instrumentisto kaj komponisto), kaj ankaŭ ano de la metalbando **Barok-Projekto**.

Jen liaj sociaj retejoj:

Facebook: www.facebook.com/rafaelmilhomemofficial/

Instagram: [@milhome.rafael](https://www.instagram.com/milhome.rafael)

Youtube: www.youtube.com/rafaelmilhomem/; www.rafaelmilhomem.com

KIEN VI IROS?

Refreno:

*Mi vojaĝas tra la mondo
Sen moviĝi de la loko
Sur la ondoj de la sonoj
Mi veturas al via lando*

*Kun la forto de la sono
Kaj potenco de la cerbo
Kun magio de la skribo
Mi ĉirkaŭas la terglobon*

*La pasporton oni ne bezonas
Por flugi al alia mondo
Nur sufiĉas liberigi nun
La flugilojn de la imago*

*Jes, mi iras kien mia
Mia menso iri povas
Tio estas la respondo
Pri kio vi demandas.*

*Jes, mi iras kien mia
Mia menso iri povas
Tio estas la respondo
Pri kio vi demandas.*












Eŭropa Festivalo
de Esperantoj (Kantoj)
European Festival of Esperanto Singers

Kien vi iros?

Speciala Premio

8-a Eŭropa Festivalo de Esperantoj Kantoj.

Rafael Milhomem



Reago de Rafael: “Mi devas diri, ke mi ege feliĉis, kiam mi legis pri tiu eŭropa festivalo, ĉar mi kredas, ke tiaj festivaloj valoras por Esperanta kulturo kaj ankaŭ por la artistoj. Tiu kanzono *Kien vi iros?* laŭ mi estas speciala, ĉar ĝi estis mia unua Esperanta muziko kun teksto. Kutime mi verkas instrumentan muzikon. La premioj ege feliĉigis min!”



La konkursa tasko: Sendu al la retadreso festivalo.eo@gmail.com viajn kantojn laŭ la rekomendata kanto kaj Rafael Milhomem elektos la plej belan version, kiun nia organizaĵo, Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej (Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, www.ecem.com.pl) premios. Viajn kantojn mi atendas ĝis la 30-a de marto 2021.

Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.



Renée Triolle

Elizabeth Eidenbenz (1913-2011)

**Juna Amiko plu prilumas
nekonatajn virinojn, kiuj helpis la
aliajn en malfacilaj cirkonstancoj.**


Vi certe vidas en televido migrantojn, kiuj devis forlasi siajn landojn pro milito. Inter ili estas patrinoj kun beboj aŭ junaj infanoj, aŭ virinoj gravedaj, kiuj naskas en la plej malfacilaj cirkonstancoj. Same okazis en Hispanio, kiam de 1936 ĝis 1939 okazis enlanda milito inter la respublikanoj kaj la naciistoj, kiuj subtenis la generalon Franco (Franko). La situacio de fuĝantaj patrinoj kun suĉinfanoj altiris la atenton de juna svisa instruistino, kiu provis helpi ilin. Ŝi aliĝis al la hispana *Asociación de Ayuda a los Niños de la Guerra* (Asocio por helpo al la infanoj dum milito). Ŝi kolektis monon en Zuriko kaj en la svisa fonduso por helpo al infanaj viktimoj de milito. Ŝia ideo estis krei akuŝdomon, kie patrinoj povos trankvile kaj sekure naski kaj poste prizorgi suĉinfanojn. Se ŝi malsukcesis en Brouilla, ŝi sekve sukcesis en suda Francio, apud Perpignan, en Elne.

En Elne staras domo, konstruita en 1901-1902, "Kastelo Bardarolle" de Eugène Bardou (Bardu'), nepo de brila entreprenisto, kiu riĉiĝis, produktante cigaredpaperon. Tiu entreprenisto estis maldekstrulo: li administris la



regionan gazeton *L'indépendant* (Sendependa), subtenis la kreadon de "Laborborso", sidejo de la sindikatoj, iĝis vic-prezidanto de regiona unuiĝo de mutualista societo, kreis politeknikan asocion en Perpignan, por disponigi senpagajn kursojn al plenkreskuloj, kaj zorgis pri diversaj asocioj en rilatoj kun infanoj. Do, supozeble li sufiĉe facile konvinkiĝis, ke eblas disponigi sian "kastelon", fakte grandan domon, kie li ne loĝis, por akcepti patrinojn kun beboj.

Tiel Elizabeth Eidenbenz instalas en ĝi nasko-domon, kiu funkciis de 1939 ĝis 1944, kiam germanoj fermis ĝin. Tie naskiĝis 597 infanoj de 22 naciecoj. Ĉar Elizabeth, kiu unue celis akcepti la hispanajn patrinojn, helpis ankaŭ judojn, ciganojn kaj ĉiujn, kiuj fuĝis pro persekutoj el sia lando. Elizabeth ne atendis, ke virinoj alvenu al Elne, ŝi baraktis por eligi gravedajn virinojn el la proksimaj koncentroj en Argeles, Rivesaltes, Gurs





aŭ Saint-Cyprien (Sen siprijen) kaj ankaŭ provizis la malliberulojn per manĝaĵoj.

Kiam devige fermiĝis la naskodomo en Elne, Elizabeth daŭrigis sian agadon en Aŭstrio, en Rekawinkel, kie ŝi helpis la viktimojn de seksa perforto dum milito (kaj bedaŭrinde, de tiam ni scias, ke seksa perforto iĝis armilo en multaj lokoj).

En 2002 Israelo agnoskis ŝin “Justulo inter la nacioj” (titolo por agnoski la homojn, kiuj helpis judojn dum la dua mondmilito). Tiam aliaj landoj malkovris ŝian valoran kontribuon al homaranismo: en 2006 Hispanio donis al ŝi “Oran Krucon de Socia Solidareco” kaj Katalunio “Krucon de Sant Jordi” kaj en 2007 Francio honoris ŝin per “Honora Legio”. La mondo malkovris ŝin, la reĝisoro Silvia Quor produktis la filmon “La lumo de espero” kun la aktorino Noémie Schmidt, pri la lukto de Elizabeth en 1942, dum Frédéric Goldbroon faris filmon por franca televido en 2002, kaj intervjuis homojn, kiuj naskiĝis en Elne.

Kiam vi ferios en Okcitanio (suda Francio), haltu en Elne kaj vizitu la domon: ĝi estas muzeo, renovigita en 2011, kaj historia monumento, protektita de post 2013. Havu simpatian penson por tiu juna kuraĝulino, instruistino kaj flegistino kaj malfermu vian koron al la nunaj rifuĝantoj, migrantoj el militlandoj.

Renée Triolle

Aoua Keita (1912-1980)

Supozeble malmultaj el ni scias, ke ekzistas premio “Aoua Keita”, kiu rekompencas “strebon, sindonemon, kuraĝon de virinoj kaj viroj”, kiuj promociigas kaj defendas la virinajn rajtojn.

Kiu estis Aoua Keita (Aua Keita)?
Ŝi estis afrika virino, verkistino, sindikatistino kaj politikistino.

Vivo kaj formado

Ŝi naskiĝis en Bamako (nuna ĉefurbo de Malio). Ŝia patro havis plurajn edzinojn kaj servis en la franca armeo. Kaj iuaspekte, danke al koloniigo, ŝi vizitis lernejojn! En 1923, kiam franca administracio provis instrui ankaŭ knabinojn, ŝia patro enskribis ŝin en por-knabinan lernejon, por plezurigi siajn ĉefojn. Sed verŝajne pro la “modelo” de Francio, li preterpasis la kutiman diskriminacion inter knaboj kaj knabinoj. Tiu situacio ankoraŭ ekzistis multlande: knaboj vizitis lernejojn, ne knabinoj.

Poste ŝi studis medicinon en la afrika altlernejo pri medicino kaj apoteko en Dakaro (1928-1931) kaj iĝis unu el la unuaj afrikaj akuŝistinoj. (Générale maljunaj





virinoj sen aparta kvalifiko helpis patrinojn naski, nur pro konoj kaj spertoj), do Aoua havis avangardan profesion. Tio jam pruvis ŝian intereson en la defendo de la virinoj, ĉar tro multaj mortis dum aŭ post akuŝoj.

Ŝi edziniĝis al kuracisto en 1935, sed eksedziniĝis en 1949, ĉar la geedzoj ne sukcesis naski infanon. La dua edzo estis fakulo, kiu laboris por Unesko en la Pedagogia Seminario de Kongo-Brazzaville.

Politika kariero

Ŝi batalis por sendependiĝo de la franca Sudano kaj kreis en 1946 Sudanan Unuiĝon, afrikan demokratan unuiĝon. Ni memoru, ke sudananoj kun aliaj afrikanoj servis en la franca armeo kaj batalis dum la Dua Mondmilito (1939-1945).

En 1950 ŝi ricevis postenon en Gao, kie ŝi laboris kaj plu aktivis por sukcesigi sian partion en la balotoj. Sed ŝi estis tro batalema kaj ne sufiĉe obeema, kaj oni transpostenigis ŝin al la akuŝejo en Kati (apud Bamako). Tie ŝi fondis Virinan Intersindikatan Movadon, kiun ŝi reprezentis en 1957 ĉe la fondiĝo de Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj de Nigra Afriko (Nigra Afriko estas esprimo el la franca por distingi la arabajn nordafrikajn



Femme d'Afrique



landojn kaj la ceteron de la kontinento). Sindikatistino¹ kaj feministino² ŝi estis elektita al la estraro de la Sindikato de Sudanaj Laboristoj en 1957, kaj en 1958 ŝi estis la sola virino en la estraro. Ŝia sperto en la diversaj asocioj estis agnoskata kaj ŝi iĝis membro de Konstitucia Komitato de la Sudana Respubliko. En 1959 ŝi estis deputito en Malio (la unua virino en tiu posteno). Kaj same ŝi estis la sola virino, kiu en 1962 prilaboris la edziĝkodon de Malio. Ni ne dubas, ke ŝi forte defendis egalecon inter edzino kaj edzo, kaj en la leĝaro, kiu konsideris, ke virino estas dumviva infano, ŝi certe puŝis defendon de la rajtoj de virinoj. Ŝi iniciatis Nacian Tagon de la Afrika virino.


Ŝi raportis pri siaj spertoj en pluraj libroj, kiujn ŝi skribas ekde 1976, kaj pro tio ŝi ricevis Literaturan Premion por Afriko. Kiel ni vidas, ŝiaj vivo kaj bataloj disvolvigis en pluraj afrikaj landoj, kaj sekve multaj landoj honoris ŝin: Malio, Etiopio, Senegalo kaj Liberio.

Ni esperu, ke ŝian batalon por plenrajtaj virinoj en Afriko daŭrigos aliaj homoj kaj ofte oni povas konstati, ke virinoj estas pli iniciatemaj kaj pli laboremaj ol viroj!

Flugema kiel vento

La rubrikon prizorgas:

Mónika Molnár



Post la unuaj tagoj, semajnoj pasis, jam eĉ monatoj. Multaj monatoj, kiuj formis kune jam tutan jaron.

Jes ja, la kronviroso mondo atingis sian unuan naskiĝtagon, sed neniu deziris festi ĝin per torto kaj kandelo. Ĉiuj sopiris al pli da libero, al malpli da danĝero kaj eĉ al la antaŭa vivo, kiun ili tiom ofte kritikis. Nun, eĉ tio bonvenintus. Sed anstataŭ tio, ĉiuj devis daŭre pacienci kaj sekvi la eventojn.



La Ulidoj ne ĉiam komprenis, kial ne eblas vojaĝi dum la lernejaj ferioj kiel antaŭe. Jes, jes, ili

komprenis la aferon pri tiu eta viruso, sed tamen...

– Avinjo, ĉu ni povos viziti niajn amikojn eksterlande dum la sekvaj ferioj?

– demandis Scivolemulido. – Aŭ se ne, ĉu almenaŭ ili povos veni ĉi tien?

– Mi ne scias, mia etulo. Estus bele, sed mi povas promesi nenion. Tio ne dependas de mi, nek de vi, nek de la amikoj. Pormomente la vojaĝoj estas tro riskaj por ĉiuj, sed kedu min, ĉiuj provas fari sian maksimumon por ke ili estu denove sekure fareblaj kaj ĝueblaj.





– Avinjo! – diris Revemulido, – Se ni kapablus vojaĝi individue per aerbalonoj, ĉu tio estus solvo?

– Mi ne scias, sed via demando memorigas min pri la sekva rakonto de Cloé ['kloe']:



Cloé de Bernardini: La Luno kaj la Suno	Estis foje knabino, kiu nomiĝis Luna. Ŝi estis tre malsama de la aliaj knabinoj, ĉar ŝi loĝis sur la Luno.	Luna tre enuis, malgraŭ tio, ke ŝi havis absolute ĉion, kion ŝi bezonis. Do, ŝi ekkonstruis raketon en sia ateliero.



		
Dum tiu tempo sur la Suno Mateo ne enuis kiel Luna, sed... Li volis tamen malkovri la mondon.	Do, li fabrikis specialan vestaĵon por astronauto kun botoj, kasko kaj oksigen-boteloj por foriri de la Suno.	Luna finis sian raketon kaj ŝi foriris. Kiam ŝi vidis la Sunon, ŝi alsuniĝis por preni manĝaj-rezervon.
		– Ho, kiom bela rakonto! – entuziasmis Revemulido. – Kaj ĉu poste Luna kaj Mateo pluvojaĝis kune? – Jes, mi kredas. – diris Avinjo. – Kaj tiel la vojaĝo estis ne nur pli interesa, sed ili povis ankaŭ helpi, subteni unu la alian. Tio tre gravas. Tre gravas, ke ni povu kalkuli unu je la alia.
Kiam Luna alvenis sur la Sunon, ŝi tuj renkontis Mateon, kiu loĝis tie. – Kiu vi estas kaj kion vi faras ĉi tie? Mi pensis, ke ĝi estas planedo sen loĝantoj. – Ne, mi vivis ĉiam ĉi tie, sur la Suno. Mi estas Mateo. Kaj vi? – Ho, ankaŭ mi vivas sur planedo, sur la Luno kaj mi estas Luna.	– Kial vi foriris de la Luno? – Mi enuis kaj mi volis vojaĝi. Do, mi decidis konstrui raketon. – Ankaŭ mi enuis, sed mi fabrikis vestaĵon por astronauto. Cetere, mi pensis foriri hodiaŭ, ĝuste kiam vi alvenis. – Ĉu vi volas vojaĝi kun mi? Estus pli interese. – Jes! Do, ni iru! – Ek!	– Ĉu tio estas io simila al tio, kion ni nun faras por protekti unu la alian de la viruso ĉie en la mondo? – demandis Scivolemulo. – Jes, io simila. Kaj se ĉiuj agos per amo, vere ĉiuj, ni povos senigi nian Teron de tiu viruso! 



Arboplantado en Herzberg

En la revuo *Esperanto* de UEA el novembro 2020 aperis koncepto pri “Kampanjo por Tutmonda Arbo-plantado” ĝis la jaro 2030.

Arboplantado preskaŭ ĉie estas rapide farebla – ĝi estas eĉ por-Esperanta varbilo kun utila efiko al la naturo, vivmedio ktp.

Jam dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj de la lasta jarcento oni ofte raportis pri tio en esperantlingvaj gazetoj, ke dum kongresoj kaj konferencoj relative ofte oni plantis arbojn. Ekzemple dum la IFEF-kongresoj tio fariĝis tradicia evento. En la nuntempo ofte forstistoj¹, naturamikoj, verduloj ktp. varbas por kaj per arboplantado, strebante savi nian planedon aŭ almenaŭ instigi la homaron por komuna kunpensado kaj ĉirilata aktivado.

Jam antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj ni – kiel Esperanto-Centro kaj GEA-Filio en Herzberg – partoprenis aktivecojn rilate al arboplantado. Por prezenti modelojn, doni helpon al plantemuloj, jen mallongaj raportoj pri niaj ĝisnunaj klopodoj kaj akiritaj spertoj.

1. Plantado de pomarboj ĉe la iama limo inter GDR kaj FRG, proksime al la vilaĝo Silkerode en Turingio. La ĉirkaŭaĵo de nia urbo etendiĝas ĝis la iama GDR-landlimo, kiu estis en ĉirkaŭ 8-kilometra distanco de la Esperanto-Centro. Kun aliaj asocioj ni plantis pomarbojn, al kiuj memorcele ni fiksas ŝildetojn. Kelkajn jarojn poste ni aŭdis, ke la t.n. “Esperanto- arboj” en aŭtuno 2020 jam produktis la unuajn pomojn. Pri tiu evento aperis gazetartikoloj kun fotoj, kiuj tiel fariĝis interesaj varbiloj por Esperanto. Cetere la limo-zonoj inter la iamaj du politikaj blokoj nun nomiĝas

“Verda Bendo” kaj etendiĝas de Rumanio ĝis Finnlando / Rusio.

2. Fruktarbo-projekto ĉe la Vinmonto (Weinberg) en Herzberg, proksime al la Welf-kastelo, daŭris kelkajn jarojn. Amika asocio “Zukunftswerkstatt Herzberg” (Futurateliero) organizis la plantadojn de pom-, pir- kaj abrikot-arboj en partnereco kun la Esperanto-Centro, la loka gimnazio kaj subten-asocioj por rifuĝintoj. Instruisto de biologio klarigis al ni ĉiuj la ĝustajn paŝojn de plantado. Kiel daŭrigon oni planis la plantadon de vinaj vitoj, sed pro financaj aferoj tio ne plu estis realigebla. Nun ĉe la fruktarba kultivejo Vinmonto staras granda daŭripova informtabulo kun grupfoto, sur kiu estas menciita ankaŭ la Esperanto-Centro. Pluraj gazetartikoloj raportis ankaŭ pri tiu projekto, kiun subtenis gravuloj de la regionaj politiko kaj kulturo.

3. Arbo-instrupado: La projekto kun Futurateliero celis aldonon de nomŝildoj al la multaj specioj de arboj laŭ la promenejo ĉirkaŭ la proksima Jues-lago. Nun sur la informtabuletoj oni povas legi la arbonomojn en la latina, germana kaj Esperanto. Por la traduklaboro ni povis bone utiligi la fakvortarojn, eldonitajn ne longe antaŭe de la Asocio de la Esperanto-forstistoj. Krom kelkaj grandaj resumaj informtabuloj, kiuj listigas la arbonomojn ankaŭ en Esperanto, aperis ankaŭ esperantlingva flugfolio pri tiu instrua promenvojo. Ĝi estas ricevebla ekz. en la



1) *Forstisto*: laboristo en flegata arbaro (=forsto).



turisma oficejo kaj fariĝis tiel konstanta varbilo por nia internacia lingvo.

4. Fruktarbo-aleoj en la proksima Juesholz-strato. Tie staras multaj divers-specaj pom- kaj pirarboj. Pomologo difinis la diversajn arbospeciojn de la fruktarboj, plantitaj laŭ la strato. Poste ni tradukis la tekstojn de la germanlingvaj ŝildetoj al Esperanto kaj do tiel oni trovas tie nun kaj esperant- kaj german-lingvaj ŝildetojn. Tio estas konstanta informado, ŝildetoj, pretigitaj antaŭ tri jaroj kaj en la germana kaj en Esperanto, por la ok diversaj ĉerizspecioj de la proksima ĉerizarba aleo.

5. Tibor Sekelj-arbo: En aŭtuno 2018 ni organizis en la kastela muzeo grandan ekspozicion honore al Tibor Sekelj, elstara mondovojaĝanto, sciencisto, esperantisto kaj aŭtoro de multaj libroj. Eĉ lia vidvino Erzsébet Sekelj aktive partoprenis la preparadon kaj ĉeestis la inaŭguron. Ni eluzis tiun okazon kaj petis la urban administracion permesi la plantadon de memorarbo. Kun Erzsébet, klubanoj kaj kelkaj gastoj, ni plantis pomarbon, t.n. someran "Klarpomon", fiksas sur ĝin nomŝildeton memore al Tibor Sekelj, sendis foton kaj raporton pri la evento al la regiona gazetaro.

6. Esperanto-herbejo. Tiun nomon ni donis al la ĝardeno ĉe la urborando, nur ĉ. 600 metrojn for de la Esperanto-Centro en Grubenhagen-strato. Tie troviĝas ankaŭ fruktarboj, bambuoj ktp. Laŭ interkonsento esperantistaj gastoj (ekzemple vojaĝantoj per Pasporta Servo) povas tendumi tie.



7. Esperanto-ĝardeno. Tiuj vortoj staras sur la ligna tabulo, eta vojmontrilo antaŭ la Esperanto-Centro Herzberg. Tra la ĝardenpordego vizitantoj alvenas al la ĝardeno, kie troviĝas multaj diverstipaj arboj kaj plantoj. Antaŭ kelkaj jaroj ni decidis aldoni al ili esperantlingvaj nomŝildetojn, kiuj fariĝis lerniloj pri la naturo por niaj klubanoj kaj gastoj. Arboj ludas gravan rolon kaj indas disvastigi ilin. Jam de multaj jaroj ni kreskigas el persikkernoj persikarbedojn, kiujn poste ni fordonacas al geamikoj, najbaroj kaj gastoj.

8. Ĝemelurba rozarbo: temas pri altkreska rozujo "Rozo de la Espero – Rose der Hoffnung", unu el la plej belaj rozoj de la mondo. Okaze de la 10-jara jubileo de Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo, en somero 2016, ni iniciatis ĝian plantadon en la korton de la urbodomo en Herzberg. La plantlaboron plenumis la urbestro de Herzberg Lutz Peters kaj la urbestrino de la pola ĝemelurbo Irena Kryszkiewicz. La arbeto ricevis klarig-ŝildeton en la germana kaj en Esperanto. La ĉiusomere belege floranta planto fariĝis simbolo de la ĝemelurba agado per Esperanto.

Inter la pozitivaj de tiuj plantagadoj ni menciis la kostojn. Aĉeto de arboj ne estas multekosta afero, sed ĝia valoro estas granda el vidpunkto de varbado, kreado de daŭripova informilo, memorigilo je la internacia lingvo Esperanto. Tia agado estas facile realigebla preskaŭ ĉie ajn.

Do, ni alvokas vin sekvi tiujn ekzemplojn en via ĉirkaŭaĵo, regiono, lando, kaj ni esperas, ke estonte dum kongresoj, seminarioj ktp. ni havos ŝancon fari kun multaj el vi komunajn publikajn plantadojn. Kaj kompreneble ni invitas vin ĉiujn planti pluajn specialajn memorarbojn en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Bv. kontakti la Esperanto-Centron (Interkulturan Centron Herzberg). Se vi havas demandon rilate arbo-plantadon, ni volonte konsilos vin surbaze de nia multjara praktika sperto.

Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar

Ni savu nian domon, nian teron, nian mondon, nin

Ĉu ekologio estas modo aŭ devo?

Ĉu la mondo, kiun ni konas, en kiu ni vivas, jam malaperas...? Ĉu ni sukcesos ekregi degradadon de la naturmedio? Ĉu ni savos ankoraŭ en kelkaj lokoj nemalpurigitan naturon? Ĉu ni scipovas haltigi turisman ekspansion, kiu por multaj lokoj estas danĝera kaj gvidas al ilia neniigo? Ĉu ni scipovas haltigi klimatsanĝojn, eltranĉon de pluvarbaroj, malpurigadon de arbaroj kaj oceanoj? Ĉu ni pretas ŝanĝi nian pensmanieron pri manĝaĵoj, vestiĝado, mondperceptado? Ĉu ni konscias, ke baldaŭ multajn specojn de bestoj kaj plantoj jam ni ne vidos en ilia natura medio? Ĉu ekologio estas ankoraŭ por ni modo, aŭ jam respondeco kaj devo?

Certe nia ekologia konscio kreskas. Multaj el ni pli larĝe rigardas protekton de la medio. Bedaŭrinde, niaj ĉiutagaj agoj (konsumado, manko de ŝparoj de energio kaj akvo, aŭ manko de grupigado de rubaĵoj) konstante en granda mezuro estas senprudentaj. Kaj ja ni estas parto de la naturo. Detruante ĝin, ni detruas ankaŭ nin mem. Ni devas kiel plej rapide fariĝi pli sentemaj je tutmondaj danĝeroj

kaj pli rapide ellerni kiel ilin preventi. Nur tiam ni pli bone komprenos dependecon inter niaj agoj kaj iliaj efikoj por nia planedo. Tial tiel grava estas nia konscio kaj la sana prudento dum la tuta vivo.

Ni rememoru jarojn de nia infanaĝo... Ĉirkaŭ ni estis multe pli pure, pli facile oni spiris, oni ne produktis tiom da forĵetaĵoj, aĉetojn oni faris kun propra sako aŭ korbo, boteloj estis vitraj kaj ne plastaj, kaj vestaĵojn kaj ĉiajn ilarojn oni uzis dum multaj jaroj, kaj ofte eluzis ilin ankaŭ sekvaj generacioj.

Ni zorgu pri nia tero! En tiu zorgo kuniĝu ni ĉiuj! Ĉiu, eĉ nia plej malgranda ago estas ege grava! Ĉiun ŝanĝon oni devas komenci enkonduki de si mem, kaj nia planedo kaj sekvontaj generacioj certe dankos al ni. Ni mallarĝigu ligilojn kun la naturo, kreante respondecan sintenon por la nuna kaj estonta mondo. Ni intervenu tie, kie oni detruas naturon je la nomo de ia ajn intereso... Ni agu, por garantii estontecon al ni, kaj al sekvontaj generacioj.

Daŭrigo sekvos kiel „Mi prudente aĉetas kaj danke al tio mi malpli da forĵetaĵoj produktas”.

Maĝosia Komarnicka





Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka
Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Nova jaro kaj nova espero...

Komenciĝis nova jaro, la jaro 2021, kiu alportu al ni nur samajn pozitivajn momentojn.

Bedaŭrinde la pandemio de Covid 19 plu daŭras kaj ni pli multe da tempo devas pasigi hejme. Ni eluzu tiun tempon kaj almenaŭ ĝian parton, por legi, legi ankaŭ al aliaj, precipe al infanoj. Legante al infanoj ni vekas en ili la deziron legi, la atenton aŭskulti kaj la interesiĝon pri la mondo.

Malgrandaj infanoj, kiuj ankoraŭ ne scipovas mem legi, ŝategas aŭskulti rakontojn. Ni eluzu tion kaj legu al ili ankaŭ en la lingvo Esperanto.

Kompreneble ni elektu mallongajn rakontojn. Feliĉe en Esperanto ni senprobleme trovas riĉan porinfanan literaturon. Mi rekomendas viziti la interretan paĝon <https://denaskuloj.home.blog/>.


Bonan legadon kaj sukcesplenan tutan jaron 2021!

Klubo de bona libro

Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), kaj helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo

Por Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas al vi la porinfanan libron *La Krubalo* (fantazia bestaĉo, vidu la bildon) de Julia Donaldson. Ĝi bele aspektas kaj eldonis ĝin Brita Esperanto-Asocio. Ĝi havas 32 paĝojn kun buntaj bildoj de Axel Scheffler – kaj ĝi estas en Esperanto. La libron redaktis Edmund Grimley Evans kaj tradukis Cyril Brosch, Tim Morley kaj Duncan Thomson.





La libron la aŭtorino verkis angle en la jaro 1999 kaj la libro ricevis sennombrajn premiojn. En la jaro 2019, okaze de la 20-a naskiĝtago de Krubalo, estis eldonita la Esperanta versio kaj la lingvo Esperanto fariĝas la 84-a lingvo, en kiun estas tradukita la libro.

La teksto de la rakonto ne estas longa. Ĝi rakontas pri aventuro de muso, kiu promenas tra arbaro. Survoje la muso renkontas multajn rabobestojn, kiuj volus manĝi ĝin. Ekzemple:



“Muso promenas tra arbaro arbusta. Vulpo ĝin vidas, kaj ĝi ŝajnas bongusta.”

Por eviti danĝeron la muso devas superruzi ĉiujn rabobestojn, kaj ĝi priskribas timigan beston, kiu loĝas en la arbaro kaj nomiĝas Krubalo. Kio okazos dum la renkontiĝo de la muso kun la bestego nomata Krubalo? Tion vi jam devas tralegi mem. Certe legado de la libro feliĉigos vin.

Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.



Ĉi-numere mi proponas viziti la eŭropan landon Germanion, en kiu loĝas profesoro Renardo Fössmeier, esperantisto, sciencisto ligita ĉefe kun Akademio Internacia de la Sciencoj kaj la universitato en Sibio.

Li helpis al mi prepari la rubrikon. Ni do prezentas al vi sudorientan parton de Germanio, ĝian federacian landon, Bavaron.

Unue per kelkaj informoj konatiĝu pri la lando. Klopodu trovi la menciitajn en la teksto lokojn sur la mapo kaj poste tralegu la legendojn kaj faru konkursajn taskojn.

Kio allogas min en Bavaron?

Bavario aŭ Bavarujo (germane: *Bayern* (legu: bajern) estas sudorienta, arbara kaj montara parto de Germanio.

Ĝi ankaŭ estas la plej granda laŭ sia areo kaj la plej industrie elvoluinta regiono de Germanio pro la firmaoj Siemens, BMW kaj Airbus. La ĉefurbo de la regiono estas Munkeno (germane: *München* [legu: *Minhen*], la tria plej granda germana urbo (post Berlino kaj Hamburgo). Ĝi estas unu el la plej gravaj centroj de kulturo, trafiko kaj ekonomio de Germanio.

La koloroj de la regiono estas blanka kaj blua, kaj tiajn kolorojn havas la ŝtata flago. Bavario havas du samrajtajn ŝtatajn flagojn. Unu estas horizontale blanka-blua kaj la alia konsistas el klinitaj romboj (kvaranguloj). La regionaj instancoj rajtas libere elekti unu el la flagoj.

La blazono de Bavario simbolas kvin regionojn:

– **Supra-Palatinato** estas simbolita de la ora leono;

– **Frankonio** estas simbolita per la ruĝa spaco kun tri blankaj pintoj; La tri blankaj pintoj ofte estas nomataj “rastilo”.

– **Malsupra kaj Supra Bavario** estas



simbolita per la blua pantero sur la blanka spaco;

– **Ŝvabio** (aŭ Ŝvabujo) estas simbolita per tri nigraj leonoj sur la flava spaco;

– **Blazono de Vitelsbaĥoj** (nobela dinastio, la regantoj de Bavario en la jaroj 1180-1918) estas simbolita pe centre situanta spaco de la blanka-blua rombotabulo.

La loĝantoj de ĉiu el tiuj regionoj havas iom aliajn kulturon kaj lingvan akĉenton. Etnografia grupo de Bavario estas bavaroj (germane: *Bajuwaren*) kaj ili uzas “bavaran lingvon”. Al ili apartenas la loĝantoj de Supra Bavario, Malsupra Bavario kaj Supra Palatinato. La loĝantoj de Frankonio estas frankonoj kaj la loĝantoj de Ŝvabio estas alemanoj.

Bavario estas la plej riĉa regiono de la nuntempa Germanio. Ĝi havas altnivelan industrion, elektronikan, aŭtomobilan, aviadilan, teksan kaj amasmedian konzernojn. Altnivela kaj produktema estas ankaŭ bavara terkulturado. Ĉi tie estas la plej granda en Germanio produktado de lakto kaj fromaĝo.

La fama Oktobrofesto okazas ĉiujare en Munkeno jam de la jaro 1810. Ĝi estas la plej granda tiutipa festivalo en la mondo kaj grava parto de la bavara kulturo. Ĝi okazas sur la “Teresa Herbejo”, danke al la princo Ludoviko de Bavario, kiu oktobre en 1810, okaze de sia edziĝo, preparis ĉevalan konkurson en tiu loko, sur tiu herbejo. Ekde tiu jaro sur ĉi tiu herbejo oni festas ĉiujare. Dum la festo estas konsumata granda kvanto da speciala festa biero kun tradicia oktobroresta manĝaĵo. Interalie

ni povas manĝi: porkrostajojn, rostitan ŝinkopopliton, rostitajn fiŝojn sur bastono, kolbasojn, knedlikojn aŭ fromaĝnudelojn, ruĝbrasikon kaj acidan brasikon. La plej bonaj bavara bongustaĵoj estas spica fromaĝa bongustaĵo (*Obatzda*) kaj blanka kolbaso (*Weißwurst*).

La bavara kuirarto karakteriziĝas ĉefe per viandaj kaj farunaj manĝaĵoj. Ĝi estas unu el la popularaj regionaj kuirartoj en Germanio. Multaj ĝiaj pladoj influis kulinaran perceptadon de la tuta Germanio.

En Bavario la popola (aŭ folkloro) vesto ludas gravan rolon. Tiu vesto estas la baza aspekto de bavara kulturo kaj portata de homoj dum diversaj gravaj oficialaj, sed ankaŭ privataj festoj. La plej konataj estas por virinoj *dirndl* kaj por viroj *lederhosen* (leda pantalono, vidu sube). Tipa regiona vesto montras, el kiu regiono la persono devenas kaj eĉ lian aŭ ŝian socian pozicion.





Ĉiuj, kiuj interesigas pri futbalo, certe bone scias, ke la fama futbala klubo *FC Bayern München* situas en **Munkeno**. La klubo estis fondita en la jaro 1900.

En Munkeno interalie valoras viziti la Preĝejon de Teatinoj (germane: *Theatinerkirche*, supre). Ĝi estas unu el la plej bonegaj sanktejoj en Bavario. Valoras ankaŭ viziti la Palacon *Nymphenburg*, la iaman someran palacon de bavara dinastio de Wittelsbach. Nun en ĝi funkcias interalie la porcelana manufakturo. Tiun palacon ŝatis viziti la plej fama eŭropa princino Sisi. En la historia urbocentro de Munkeno troviĝas la Katedralo de Munkeno (germane: *Frauenkirche*, sube), trinava (3-ĉambra) malfrugotika brikkonstruaĵo kun ĉirkaŭira kapeloringo. En Munkeno oni povas ankaŭ viziti Rezidejon (germane: *Residenz*), la rezidejon de reĝoj de Bavario en Germanio.



Foto: Renardo Fössmeier

Nurenbergo (Nürnberg) estis en la 16-a jarcento forta presarta centro kaj tie estis eldonita en 1543 grava verko de Nikolao Koperniko “*De revolutionibus orbium coelestium* (Pri la turniĝo de ĉielaj sferoj)”. En la verko Koperniko tezis, ke la tero kaj la planedoj iras ĉirkaŭ la suno kaj do male, ol antaŭe instruis la kristana eklezio. En Nurenbergo vi ankaŭ povas viziti tombon de Veit Stoss, la fama ligno-skulptisto de la malfrua gotiko.

En **Würzburg**, kiu situas en Malsupra Frankonio, estas Rezidejo de Würzburg, la baroka palaco, la plej longa en Eŭropo kaj enskribita en la mondan kulturen heredaĵon.

La pilgriman preĝejon, Preĝejon de la Prato, kiu estas enskribita en mondan heredaĵon de Unesko, vi vidos en la plej fama **Wieskirche**, kiu troviĝas sude, en Supra Bavario (proksime de la urbeto Steingaden). En la historia regiono Frankonio, en Supra Frankonio, situas eksterordinara urbo Bamberg, kies mezepoka urbokerno ankaŭ estas enskribita kiel monda heredaĵo de Unesko. Ankaŭ en Meza Frankonio, en Heilsbronn, estas Monaĥejo el la jaro 1132. En la monaĥejo oni povas admiri bildojn de Albrecht Dürer. Landshut, en Malsupra Bavario, estante ĝia ĉefurbo, estas fama interalie pro festeno, kiu ĉi tie okazas ĉiun kvaran jaron, por eternigi pompegan geedziĝfeston de la duko Georgo la Riĉa kun la pola reĝidino Jadwiga Jagiellonka, el la jaro 1475. La nuna festo okazas de la jaro 1903 kaj nomiĝas “Princa Geedziĝo de Landshut”. Laŭ la rivero Danubo, en Supra Palatinato, situas la urbo Regensburg, ĝia ĉefurbo. La urbo estas enskribita en mondan heredaĵon de Unesko kaj allogas turistojn interalie ĝia mezepoka urbocentro. Ne eblas transdoni eĉ parteton de la belaj kaj vizitindaj lokoj en Bavario, regiono, en kiu oni ĉiupaŝe ĉion admiras. Bavaroj estas afablaj, helpemaj, sed ankaŭ konservemaj kaj ege precizaj. Efike ili realigas siajn planojn. Agrable estas renkonti bavaron, kiu ĉiam kore salutos nin “*Grüß Gott*” (Dio benu vin).





Esperanto en Germanio disvolviĝas preskaŭ de sia ekesto. La unua Esperanto-grupo estis fondita de Leopold Einstein jam en la jaro 1888 en Nurenbergo (Nürnberg), kaj ĝi estas la plej malnova Esperanto-grupo en la mondo. Sur la loĝdomo de la fondinto, Weinmarkt 14, estas memoriga tabulo pri Leopold Einstein.



En Munkeno jam en la jaro 1891 estis fondita Societo Esperantista München.

Legendoj

Profesoro Renardo Fössmeier proponas tralegi kvar regionajn legendojn el Bavario. Vi ekscios, ke ĉiam valoras esti bonaj por aliuloj, alie vi povas esti transformitaj al monto, ŝtono, roko aŭ fantomo.

La kruela reĝo Watzmann

En la regiono de la urbo Berchtesgaden, en la plej sud-orienta angulo de Bavario, laŭdire iam regis reĝo, kiu nomiĝis Waze, Wazeman aŭ Watzmann [*vacman*]. Li estis kruela kaj amis nur sian familion, nome edzinon kaj sep gefilojn, kaj la ĉasadon de sovaĝaj bestoj; tiujn li pelis ĉevalrajde kaj



fine igis siajn hundojn disŝiri la ankoraŭ vivantan predon. Li ĉasis ne pro la viando, sed nur pro la plezuro vidi la doloron de la turmentataj ĉasbestoj.


Unu tagon la ĉastrupo de la reĝa familio rajde preterpasis bieneton, antaŭ kiu sidis maljunulino, lulanta nepeton. Kiam la reĝo vidis ilin, li direktis sian ĉevalon flanken kaj igis ĝin hufpremi la kompatindulojn. Pro iliaj krioj la bienulo kaj lia edzino alkuris el la domo; ilin trafis la sama sorto, je la amuzo kaj rido de la reĝo kaj lia familio.

Dum siaj lastaj sekundoj la bienistino levis sian manon kaj flustris: “Dio punos, kion vi faris; li vin transformos en rokojn.” Kaj tuj la grundo ekstremitis, la krueluloj falis de siaj ĉevaloj, kaj kiam ili tuŝis la grundon, ili iĝis rokoj, grandaj kiel montoj.

De tiam sude de Berchtesgaden staras la Watzmann-montoĉeno, kiu konsistas el du preskaŭ same altaj pintoj (2713 metroj kaj 2712 metroj) por la gereĝoj kaj malpli altaj pintoj, kiuj simbolas la gefilojn.

Gundulino de la Fojna Monto

Kie la baseno de Rosenheim limas al la nordaj Alpoj, proksime de la vilaĝo Nussdorf, situas la monto Heuberg (Fojna Monto). Ĝi altas iom malpli ol 1400 metrojn, do povas porti fekundajn herbejojn. Kaj ĝian sud-okcidentan flankon somere favoras la suna lumo, tiel ke kamparanoj tie paŝtas siajn bovojn, kiuj tamen vintre devas reveni al la valo. Tion oni nomas alpeja mastrumado. La nomo Fojna Monto montras, ke la alpaj herbejoj tie ne nur somere nutris bovojn, sed eĉ provizis fojnon, uzeblan kiel provizaĵo por la vintro. Iam la plej fekundan alpon de Fojna Monto



zorgis alpistino, kiu nomiĝis Gundulino. Ŝi estis diligenta, sed malafabla. Ŝi ŝatis neniun kaj estis kontenta somere vivi sur la soleca alpejo, kie malofte preterpasis aliaj homoj. Iun tagon ŝi bakis panon en sia forno, kiam alproksimiĝis maljunulo, aspektanta malriĉe. Flarante la odoron de la freŝa pano, li petis pri peceto, sed la malafabla Gundulino insistis, ke ŝi ne havas panon, kaj ke ŝia bakforno estas malplena. Levante ŝtonon ŝi diris: “Jen mia tuta provizo. Se tio ne veras, mi estu transformita en tian ŝtonon!”

En tiu momento nigraj nuboj leviĝis okcidente ĉe la monto Wendelstein, kaj terura fulmotondro formiĝis, kiu frapis la tutan alpejon per fulmoj. Kiam leviĝis la nuboj, la fekunda herbejo estis for, ne kreskis eĉ unu tigo. Restis nur la senkompata alpistino kaj ŝia bakforno – sed transformitaj al rokoj.

Du montopintoj okcidente de Heuberg nun portas la nomojn Kundl (= Gundulino; 1115 metroj) kaj Backofen (= bakforno; 1136 metroj), kiel avertiloj al homoj, kiuj ne kompatas siajn proksimumojn.

La diablo kaj la vento de Erl

En la valo de la rivero Inn, kiu el la tirolaj Alpoj fluas al Bavario, situas la vilaĝo KIRSTEIN. Aliflanke, sur la tirola (aŭstria) bordo, situas la vilaĝo Erl; ĝi nun estas konata pro siaj pasionaj prezentaĵoj. La loĝantoj ambaŭflankaj estas de bjuvara deveno kaj havas komunan tradicion. La vento, kiu blovas laŭlonge de la

valo, kutime matene venas de sudo kaj ofte portas varmon, kiun ĝi kolektis malsuprenirante de la montoj. Tagmeze ĝi ofte ŝanĝas sian direkton kaj reiras suden. Tio plej rimarkeblas ĉe la elirejo de la valo ĉe Erl, tial oni nomas la venton “Erler Wind” (= vento de Erl). Nokte la ventodirekto kutime reŝanĝiĝas.

Laŭ legendo iam tiu vento iris nur unudirekte. La diablo, admiranta la rapidecon de la vento, aliĝis al ĝi, kaj dum iom da tempo ili kune laŭkuris la riveran valon. Sed alvenante proksime de KIRSTEIN, la diablo diris al la vento: “Bonvolu atendi momenton, mi devas iri aliborden, al Erl, sed tuj revenos.” Tamen la diablo neniam revenis, kaj nun la vento ĉiutage iras norden-suden laŭ la valo, serĉante la diablon, kiu tamen jam delonge iris aliloken.

Sovaĝaj ŝipistoj sur la rivero Inn

Iam la rivero Inn estis uzata por ŝipa vartransporto. Pro la varia profundeco de la akvo, kun danĝeraj rokoj, la ŝipoj havis platajn fundojn kaj nomiĝis plat-ŝipoj (*Plätten*). Irante al la valo ili povis drivi kun la fluo de la rivero, sed por la alia direkto necesis ĉevaloj, kiuj tiris la ŝipojn, trotante sur la rivera bordo.

La ŝipanaro de tia platŝipo, aparte granda, estis krudula grupo; ili ne atentis aliajn ŝipojn aŭ homojn, piedirantajn sur la riverbordo. Kiu renkontis ilin, devis fuĝi, por ne kolizii kun ilia ŝipo, aŭ trafi sub la hufojn de iliaj ĉevaloj. Sed iun tagon la ŝipo maltrafis la – ofte ŝanĝiĝantan – ĉefan fluejon de la rivero kaj estis blokita de sabla bariero.

La ŝipistoj uzis sian tutan forton kaj fine sukcesis per siaj stangoj depuŝi la ŝipon de la bariero. Sed la rivera fluo turnis la ŝipon transversen, la larĝo de la fluejo ne





sufiĉis, kaj granda roko frakasis la flankon de la ŝipo. Eĉ ne unu ŝipano sukcesis savi sin. Multaj homoj konsideris la akcidenton dia puno por ilia kruela konduto. Oni diras, ke la animoj de la kruelaj ŝipistoj ne povis eniri en la kristanan ĉielon, sed devas nun fantomi surtere. Kiam vespera vento trablovas sub la ponto de Nussdorf, oni diras, ke la aŭdeblaj sonoj estas la kriado kaj blasfemado de tiuj ŝipistoj, kaj la muĝado de la akvo sub la korpo de platŝipo. Oni rekomendas, ke, aŭdante tion, oni ekkuŝu surgrunde kun la brakoj krucitaj sur la brusto. Alie la kruelaj ŝipistoj povus onin devigi akompani ilin kaj fantomi kun ili.

LA KONKURSA TASKO estas jena:
Desegnu aŭ pentru bildo(j)n, kiu(j) bild-forme prezentos bavarajn legendojn.
Kreu ankaŭ po 5 demandoj al ĉiu legendo.

Finante la rubrikon bonvolu tralegi la poemon “Nova tago – espero” de Mária Erzsébet Eszes (esperantistino, la ĥor-estrino de la hungara koruso La FÖNIX). Mária ankaŭ pentris la apudan bildon “Vintra sorĉo”.



Nova tago – espero

Finite! – mi jam preskaŭ kredis.

Tamen ne! – la sorto objektis.

***Venos nova tago brile,
La morgaŭo belos plie!***

Karesas min voĉa helo,

Alvenos la nova espero.

Kaj ni ree vivi pretas,

Dio helpos, se mi petas.



La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30-a de marto 2021, al la adreso: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.

La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole: *Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej*).



**Bamberg, turoj de la katedralo,
vido de Michelsberg.
(Fotoj: Renardo Fössmeier)**



**Bamberg, la trabfaka domo
Habergasse 14, vido de nord-okcidento.**




**La fortikaĵo Marienberg
en Würzburg, vido de sur la
ponteto Sebastian Kneipp.**



Luiza Carol

Arne la ĉefido

Emociiga sagao por adoleskuloj kaj plenkreskuloj. Rakonto el la “vikinga epoko” de Leif Nordenstorm, 2005, Kava-Pech, ilustraĵoj de Pavel Rak. 2019, 3-a eldono, 114 paĝoj.



Mi legis senspire la fascinan sagaon pri Arne, la 11-jaraĝa filo de vikinga ĉfo, vivinta en la 9-a jarcento.

Ĝi estas samtempe historia romaneto kaj ankaŭ psikologia rakonto pri la evoluo de la juna protagonisto. En la postparolo la aŭtoro precizigas la raporton inter la historiaj konataj faktoj kaj la fantaziaj elementoj: “Tiu ĉi rakonto estas fikcia. Tio signifas, ke ĝi estas elpensita, fantazia rakonto. Tamen ĝi estas realisma. Eble okazis io simila al la okazintaĵoj en la libro. Vikingoj el Svedio kaj el ceteraj Nordiaj landoj vojaĝis ekde ĉirkaŭ 800 p.K. kaj dum 250 jaroj poste al fremdaj landoj en vojaĝoj, kiuj estis kombinaĵo de komercaj vojaĝoj, rabado kaj elmigrado. Tiu ĉi parto de la ferepoko en Nordio tial nomiĝas la vikinga epoko. Ansgar (801-865) kaj Vitmar estas historiaj personoj. En la jaro 829 ili vojaĝis kiel misiistoj al la tiam pagana Svedio. La celo estis la urbeto Birka, ...” – Mi interrompas ĉi tie la citaĵon, por lasi al la legantoj la plezuron informiĝi mem pri la resto de la historia kadro de la rakonto.

Malnovaj sagaoj samkiel modernaj aventurfilmoj prezentas kutime la kruelajn militojn de la vikinga epoko kaj la kuraĝajn luktojn de la tiutempaj homoj kontraŭ la malmilda malvarma vetero de la nordo kaj kontraŭ la tieaj sovaĝaj bestoj. Sed en la kortuŝa sagao de Leif Nordenstorm la plej emociigaj aventuroj okazas en la animo de la juna protagonisto. La tuta romano priskribas kelkajn monatojn en la vivo de Arne, knabo, kiu fariĝos plej verŝajne la sekva ĉfo

en sia vikinga vilaĝo, kiam lia patro maljuniĝos. Ĉio okazas en la aŭtuno de 829, tuj post kiam piratoj kaptis la ŝipon de Ansgar kaj Vitmar. La du misiistoj devis daŭrigi perpiede sian vojaĝon al la urbeto Birka, kaj ĝuste dum tiu ĉi relative longa piedirado ili gastas mallonge kaj dankeme en la vilaĝo de Arne. La vizito de Ansgar kaj Vitmar lasas spurojn en la animo de la juna ĉefido, kiu troviĝas en la delikata aĝo de spirita formiĝo.

La sagao komenciĝas poemece, per la vortoj, kiujn Arne legas sur runŝtono. Tiuj vortoj rememorigas la avon de Arne (la patron de lia patro), kiu havis la saman nomon. Jen la vortoj ĉizitaj sur la ŝtono: “Björn starigis la ŝtonon memore al Arne, sia patro. Li manĝigis la aglon en Kurlando.” Ĉe la fino de la libro aperas listo de klarigendaj vortoj kaj esprimoj, el kiu ni ekscias ke “manĝigi la aglon” estis poezia esprimo, kiu signifas morti, kaj Kurlando estis regiono en nuna Latvio. La vortoj de la runŝtono enkondukas nin en misteran aventuroplanan mondon.

La libro portas la leganton en la vikingan epokon kvazaŭ pere de tempomaŝino. Ni ne travivas kune kun Arne la malmildan vintron de lia lando, sed ni ja spektas pere de vivoplenaj priskriboj la intensajn aŭtunajn preparojn por la longa vintro: oni anstataŭigas la tegmentojn, oni riparas la ferajn ilojn, oni akumulas sekigitajn berojn kaj fumajitan viandon, oni trikas lanajn vestaĵojn ktp. La ĉiutaga laborego estas dividita relative strikte inter viroj kaj virinoj, sed ankaŭ inter liberuloj kaj sklavoj. Oni ne travivas kune kun la protagonisto piratajn atakojn aŭ kruelajn militojn inter vilaĝoj, sed oni spertas la ĉiutagan senton, ke ja ekzistas en la ĉirkaŭaĵo militemuloj, kiuj povus iam ajn rabi, mortigi aŭ sklavigi la kaptotojn.

La spirita evoluo de Arne okazas iom post iom. En la komenco ni vidas lin spektantan scivole grandan ĉasadon de alkoj, sen klara sento de kompatato por la belegaj bestoj, mortigataj laŭ kruelega maniero pere de kaptofoso. Arne kaj lia amiko ekridas, rememorante okazaĵojn, kiam vilaĝano akcidente falis en la saman kaptilon kaj vundiĝis grave. Tamen, kiam Arne pensas pri homa sufero anstataŭ besta sufero, lia rido fariĝas iel malgaja, ĉar lia animo eksentas nebulan maltrankvilon, proksimiĝantan al konscia


kompato. Baldaŭ Arne mem falas akcidente en la kaptilon, sed pro granda bonŝanco li ricevas nur neglektindan vundon. Malgraŭ tio la ŝoko estas tre granda kaj oni povus supozi, ke estonte la knabo ne plu ridos tiom facilanime pri la vundoj de aliuloj. Sed ni ne forgesu, ke Arne estis edukita por fariĝi efika ĉasisto kaj timiga militisto, por kiu kompatado devas esti stranga ideo... Fakte nur unu tagon post tiu akcidento, kiam la infanoj ludas ĉasludon kun ludillancoj, Arne subite proponas, ke la samaĝa sklava knabo Trumbe ludu la rolon de alko. Post kiam la eta sklavo estas frapita per lignaj ludillancoj kaj primokita, Arne sentas konscienciproĉojn. La iom-post-ioma aliformiĝo de la animo de Arne ĝis la momento, kiam li kapablas pardonpeti al la sklavo, ŝajnis al mi la plej valora parto de la romano. La personeco de Arne maturiĝas, ĝis li komprenas, ke la vera kialo de lia malbona konduto estis lia deziro kaŝi de aliuloj (eble ankaŭ de si mem?) sian naturan inklinton kondukti amikeme kun la samaĝa sklavo. Tio okazis, ĉar la tiamaj sociaj tradicioj malpermesus al sklavo ludi per armiloj (eĉ se temas pri ludilarmiloj) kaj precipe malpermesus al sklavo fariĝi amiko de liberulo, des malpli al filo de la ĉefo. La edifaj klarigoj de la misiisto Ansgar kaj la sinceraj konfeso de lia propra avo (la patro de lia patrino), igas la junan Arne ekmediti pri sociaj maljustecoj kaj pri la signifo de vera libereco. La avo rakontas, kiel li sukcesis konvinki sian patron permesi al li edziĝi al sklavino, kontraŭe al la sociaj kutimoj. Jen la koncerna dialogo: “Mi diris ke se mi estas libera, mi devas esti libera edziĝi al tiu, kiun mi volas, ĉar nur sklavo ne rajtas fari kiel li volas; kaj se mi ne estas libera, mi estas sklavo, kaj tiaokaze mi ja devas havi la rajton edziĝi al sklavino.”

Laŭ la rakonto de la avo, tiu brila argumento igis la praavon de Arne liberigi la sklavinton, por ke lia filo edziĝu al libera virino.

La sociaj malegalecoj kaj maljustecoj aperas plej kruele kiam temas pri rilatoj inter infanoj aŭ inter adoleskuloj. Leif Nordenstorm sukcesas priskribi tre detale kaj delikate la ŝanceliĝojn de la juna animo, fokusante sian atenton al protagonisto, kiu travivis sian plej tiklan aĝon, sur la sojlo inter infaneco kaj adoleskanteco. Tial la interna evoluo de Arne ŝajnas al mi eksterordinara psikologia priskribo, pro kiu la aŭtoro meritas varman gratulon.

Ankaŭ la rilatoj inter homoj kaj bestoj estas interese prezentataj. En la komenco Arne ne ŝajnas kompati la kruele mortigitajn alkojn, sed post kelka tempo ni rimarkas, ke li afable alparolas bovinajn kaj certas, ke tiuj komprenas lin. La plej memorinda interkomunikado inter homoj kaj besto estas la renkontiĝo de Arne kaj Trumbe kun granda urso. Fakte tiu ĉi renkontiĝo inter du senarmilaj knaboj kaj la danĝera besto fariĝas unu el la plej sensohavaj momentoj de la sagao. Tiam la sklavo, kiu estas kristana, faras la krucosignon per sia mano, Arne imitas lin, kaj la urso... foriras! Ŝajnas, ke la knaboj tutkore fidis la protektan valoron de la krucosigno, tial la besto sentis ilian neagreseman kuraĝon kaj decidis ne ataki ilin... Similaj okazaĵoj ja ekzistas kelkfoje en la realo. Mi kredas, ke la homa menso per si mem estas sankta miraklo, kaj inter ĉiuj aspektoj de la mensaj kapabloj hipnozo (inkluzive de memhipnozo) estas eble la plej mistera, la plej fascina, la plej spirita... Ĉiuokaze ambaŭ knaboj konsideras tiun eventon kiel neforgeseblan pruvon de la potenco de Dio de amo. La supereco de tiu ĉi Dio kompare kun la kruela Toro (la praskandinava dio, postulanta sangoplenajn oferojn) ŝajnas pli kaj pli evidenta al ambaŭ infanoj. La sagao finiĝas optimisme, substrekante la gravecon de tiu epizodo por la estonto de la protagonistoj. Jen la lasta paragrafo: “Kiam la suno staris plej alte sur la ĉielo, la ŝipo preteriris insulon kaj Arne ekvidis preskaŭ rondan monteton sur la bordo norde de la golfeto. Tio devas esti la monteto ĉe la herbejo, kie la urso montriĝis. Arne rigardis Trumbe kaj Trumbe rigardis Arne. Poste ili ekridetis.” Pri la estonta vivo de la protagonisto oni povas esperi, ke li fariĝos kuraĝa, sed neagresema ĉefo, kiu kondukos bone al la sklavoj en sia vilaĝo kaj eble eĉ liberigos ilin, kondukos respektoplene kun la kristanoj kaj eble li mem iĝos kristano... La libro entenas multajn belajn priskribojn de pejzaĝoj, kiujn kompletigas la memorindaj bildoj fare de la elstara grafikisto Pavel Rak. La teksto estas kolorigita per proverboj el la Proverbaro de Zamenhof kaj per poemecaj simboloj. La ofta uzo de “ho” por alvokoj substrekas la poemecan etoson. Ekzemple: “Jes, ho patro, tion ni faros.” “Ho Arne, ni forgesis niajn kaptovergojn”, k.s.

“Arne la ĉefido” ŝajnas al mi la plej altnivela beletraĵo, rekomendinda al legantoj ĉiujaj.



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_esperto@mail.ru



Savu la Planedon kun Kungfua Kunikleto!



Saluton, karaj legantoj!

Interkultura mondo gratulas ĉiujn siajn legantojn okaze de la veninta Nova, 2021-a jaro!



Ĉi-foje ni sendas bondezirojn kun aparta ĝojo kaj forta espero. Finiĝis malfacila jaro. 2021, espereble, liberigos la homaron finfine de la danĝera pandemio. Jam aperas pozitivaj novaĵoj tiufланke. **Do, sanon, trankvilon kaj prosperon al ni ĉiuj en 2021 deziras *Interkultura Mondo*!**

En 2020 dum la tutmonda memizolado en interreto komencis aperi novaĵoj pri ŝanĝoj en ekosistemoj de nia planedo. En kanaloj de Venecio akvo puriĝis kaj naĝas cignoj. En parkoj de Berlino nestas raraj birdoj. Sur stratoj de urboj vagadas sovaĝaj bestoj. La aero super grandegaj urboj iĝis travidebla.

Do, la kronviruso nevole devigis homojn pripensi la ekologian staton de nia planedo. Nia intenco mastrumado jam delonge detruas naturon, ĝian fragilan biologian ekvilibron. En ĉiutaga tumulto ĉiam mankas tempo por pripensi tion. Sed beleco kaj biologia varieco estas tre nestabila. Kiel savi la planedon? Kiel harmoniigi kunvivadon de la naturo kaj la homo?

Tiuj pripensoj iĝis ĉefaj por la nova projekto "Kungfua kunikleto". Temas pri la nova animacia filmo kun la ĉefa heroo – kunikleto. La filmo havas signifan nomon – "Savu la Planedon kun Kungfua Kunikleto". La kerna enhavo estas jenaj: amuza





besteto kun siaj amikoj travivas diversajn aventurojn kaj luktas por protekti naturon kaj savi planedon.

La ideo apartenas al la hispana reĝisoro Miguel Herberg kaj naskiĝis en 2005 en la ĉina urbo Dalián Shì. La ĉefaj celoj de la projekto estas eduki homojn por protekti naturmedion, interkomprenon kaj sanan vivon. Alia celo estas protekti Esperanton, la perfektan ilon por tutmonda interkompreno. Laŭ intenco de la aŭtoroj tio devas esti neordinara animacia filmo kaj serio de interagaj libroj. Estas plano, poste produkti originalajn kantojn, edukajn aplikaĵojn en diversaj lingvoj kaj aliajn diversajn produktaĵojn. Ĉiuj farotaĵoj enhavos faktojn pri naturmedio kaj ĝiaj problemoj.

La iniciatintoj alvokis ĉiujn instituciojn kunlabori por tiu projekto. Tamen la planoj dormis ĝis la jaro 2017. Tiam CCTV – la ĉina televido “China Central Television (CCTV) Animations Inc.”– eksciis pri la filmo kaj diris, ke ĝi certe kontribuos, se ankaŭ eŭropaj naciaj televidoj tion faros, ĉar “ili ne povas savi la planedon solaj.” Unu el la ĉefaj organizantoj iĝis la Fondaĵo NINGNA kaj ĝia estrino. La tuta teamo inkluzivas multajn fakulojn: verkistojn, muzikistojn, komponistojn, teknikistojn, tradukistojn kaj aliajn.

Poste en la jaro 2020 okazis alia evento. La filmisto kaj manaĝero Maximiliano Garcia venis al Italio por partopreni en la evento “Teo kaj Amo: Interkultura Dialogo”. La aranĝo, kvankam memstara, prunteprenis la sukcesan nomon de la fama projekto de Ĉina Radio Internacia. Organizis la eventon la Esperanto-grupo Giorgio Canuto de Parmo, Itala Ĉefurbo de Kulturo-2020. Tie Maximiliano Garcia kontaktiĝis kun Alessandra Madella, aktivulino el Parmo. La Itala Esperanto-Federacio helpis lin pretigi unuan prezent-videon en Esperanto. Alessandra alportis la projekton al ILEI, kies prezidanto Mireille Grosjean reagis pozitive. Tiel poiome kreiĝis granda projekta teamo. Kuncerbumado kaj preparlaboroj por krei la dosieron komenciĝis.

Rezulte aperis detala agadplano por disvastigi la projekton tra la tuta mondo kaj serĉi kunlaborantojn kaj financadon. Ja protekto de la naturo kaj “sana” planedo estas zorgo por la tuta homaro.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj intencas vaste diskonigi la projekton tra siaj kanaloj kaj helpi en tradukado de serioj al diversaj lingvoj. Ja celoj de ILEI plene kongruas kun la projekto: “Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al



la naturo; progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj”.

Krome, la nova iniciato havas kiel ĉefan celon edukon valoron. La stelulo de tiu animacio – Kungfua Kunikleto – uzas saĝajn vortojn eĉ pli ol batalartajn movojn. Ĝiaj malamikoj estas la dezertigado de la Tero, la malapero de abeloj, la fandado de la glacimontoj, la poluiga rubforigo. Kaj ĝenerale ĉio, kio malebligas al infanoj pli aŭtentan sperton de la naturo. Tial ĉiuj ĉapitroj havas grandan pedagogian valoron. Multaj sciencaj fakuloj eniras la teamon kaj helpas en la verkado por garantii la edukon efikon.

Novembre 2020 la projekto “Savu la Planedon kun Kungfua Kunikleto” aperis en la informilo de UEA por Unuiĝintaj Nacioj.

La detalan informon kaj prezenton de la projekto eblas vidi ĉe Esperanto kaj Edukado ILEI en youtube, www.ilei.info, www.ningna.net (anglalingve).

Do, karaj legantoj, bonvolu viziti informojn laŭ la ligiloj kaj helpi al Kungfua Kunikleto. NI SAVU NIAN PLANEDON KUNE KAJ PERE DE NIA LINGVO ESPERANTO!

Interkultura mondo esprimas koran dankon al Maximiliano Garcia, Alessandra Madella, Mireille Grosjean kaj al ĉiuj aliaj kreantoj de la projekto pro la disponigitaj materialoj.



Por lernemuloj:

Nivelo 1. Rerakontu la tekston (ĝian parton) laŭ la alineoj.

Nivelo 2. Respondu la demandojn:

1. Kiuj novaĵoj mirigis homojn dum la tutmonda memizolado?
2. Kiam naskiĝis Kungfua Kunikleto?
3. Formulu la ĉefan ideon de la filmo.
4. Kiuj fakuloj estas bezonataj por savi la planedon?

Nivelo 3. Rakontu, kiel vi helpas savi nian planedon.





Mireille Grosjean

Legu kaj ordigu

(laŭ sugesto aperinta kadre de VEKI,
Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI 2020)

Kiel higiene manĝi

(Metu la frazojn en ĝusta kaj racia vicordo)

“Nun ni ekmanĝu!” – diris la gastigantaj gepatroj. – “Bonvenon! Saluton! Ĉu vi bone vojaĝis ĝis nia domo? Ĉu vi fartas bone?” – temas pri karotoj, kukumoj, florbrasiko kaj fenkolo. – Sekvas propono kaj diskuto pri taskodivido. – La gepatroj anoncas: “Hodiaŭ post unu horo ni havos gastojn. – Laŭ tio ĉiuj komprenas, ke lavi siajn manojn gravas ne nur antaŭ preparado de manĝaĵoj, sed ankaŭ antaŭ manĝado. – La familio AMIKOJ venos viziti nin!” – “Se vi tranĉas la per saŭco kovritan parton de la karoto per viaj dentoj, vi ne povas poste meti tiun duan parton en la saŭcon! – Baldaŭ ĉio pretas. – Nun ili volas ĉiuj kune prepari ion por manĝeti antaŭ la ĉefmanĝo. – Ĉiuj aŭdas la sonorilon ĉe la ĉefpordo de la domo. – “Ni kune preparis tion!” – anoncis fiere la

infanoj. – La infanoj portas la saŭcobovlojn kaj la legomotelerojn al la manĝoĉambro. – Ĉiuj kune iras al la kuirejo. – La infanoj helpas la patron en senŝeligado de legomoj. – La gastoj forprenas siajn mantelojn kaj siajn ŝuojn ĉe la enirpordo. – La unua etapo antaŭ ia eklaboro en la kuirejo estas: lavi siajn manojn. – Tiel la pretaj manĝaĵoj ne ricevas ian polvon dum la atendo. – Tiam la gepatroj klarigas, kiel higiene manĝi tian manĝaĵon: – La infanoj provas, komprenas, kaj kontentige plu manĝadas. – Vi devas turni la karoton en via mano kaj meti la alian finon de la karoto en la saŭcon por manĝi kun saŭco la duan parton de via karoto!” – La patrino forprenas la tukon, la pretaj manĝaĵoj aperas. – La patrino komencas prepari diversajn saŭcojn, dum



la patro okupiĝas pri la legomoj. – La infanoj kuras por malfermi la pordon. – La infanoj senpacience ĉerpas saŭcon el la bovlo per karotobastoneto kaj plezure mordas en ĝi. – Post senŝeligado ili tranĉas la legomojn en formo de bastonetoj, same grandaj kiel cigaredoj. – Ĉiuj iras al la manĝoĉambro. – Se vi farus tion, iom de via salivo irus en la saŭcon kaj malpurigus ĝin. – La patro komencas senŝeligi la legomojn: – Dum atendo la patrino kovras la plenajn bovlojn kaj telerojn per tuko.



La solvo: La gepatroj anoncas: “Hodiaŭ post unu horo ni havos gastojn. – La familio AMIKOJ venos viziti nin!” – Nun ili volas ĉiuj kune prepari ion por manĝeti antaŭ la ĉefmanĝo. – Ĉiuj kune iras al la kuirejo. – La unua etapo antaŭ ia eklaboro en la kuirejo estas: lavi siajn manojn. – Sekvas propono kaj diskuto pri taskodivido. – La patro komencas senŝeligi la legomojn: temas pri karotoj, kukumoj, florbrasiko kaj fenkolo. – La patrino komencas prepari diversajn saŭcojn, dum la patro okupiĝas pri la legomoj. – La infanoj helpas la patron en senŝeligado de legomoj. – Post senŝeligado ili tranĉas la legomojn en formo de bastonetoj, same grandaj kiel cigaredoj. – Baldaŭ ĉio pretas. – La infanoj portas la saŭcobovlojn kaj la legomotelerojn al la manĝoĉambro. – Dum atendo la patrino kovras la plenajn bovlojn kaj telerojn per tuko. – Tiel la pretaj manĝaĵoj ne ricevas ian polvon dum la atendo. – Ĉiuj aŭdas la sonorilon ĉe la ĉefpordo de la domo. – La infanoj kuras por malfermi la pordon. – “Bonvenon! Saluton! Ĉu vi bone vojaĝis ĝis nia domo? Ĉu vi fartas bone?” – La gastoj forprenas siajn mantelojn kaj siajn ŝuojn ĉe la enirpordo. – Ĉiuj iras al la manĝoĉambro. – La patrino forprenas la tukon, la pretaj manĝaĵoj aperas. – “Ni kune preparis tion!” – anoncis fiere la infanoj. – “Nun ni ekmanĝu!” – diris la gastigantaj gepatroj. – La infanoj senpacience ĉerpas saŭcon el la bovlo per karotobastoneto kaj plezure mordas en ĝi. – Tiam la gepatroj klarigas, kiel higieno manĝi tian manĝaĵon: – “Se vi tranĉas la per saŭco kovritan parton de la karoto per viaj dentoj, vi ne povas poste meti tiun duan parton en la saŭcon! – Se vi farus tion, iom de via salivo irus en la saŭcon kaj malpurigus ĝin. – Vi devas turni la karoton en via mano kaj meti la alian finon de la karoto en la saŭcon por manĝi kun saŭco la duan parton de via karoto!” – La infanoj provas, komprenas, kaj kontentige plu manĝadas. – Laŭ tio ĉiuj komprenas, ke lavi siajn manojn gravas ne nur antaŭ preparado de manĝaĵoj, sed ankaŭ antaŭ manĝado.

Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...

Ili ne forprenis la paperan kovrilon de la trinkŝalmo! Estos ia aĉa papera konfitaĵo en mia mangosuko!

Mi sidis en restoracio en Kotonuo, Benino, kiam mi mendis mango-sukon. Mi ricevis grandan glason, plenan de freŝe premita suko de tiu bongustega afrika frukto. Trinktubeto staris en ĝi, kun papero! Post komenca surprizo kaj malkontento mi pli atenteme rigardis, kaj povis konstati, ke la kelnero lasis nur mallongan parton de tiu papera protektilo, ne la tuton, nur la parton de la suĉtubeto, kiu staris super la suko kaj kiu eniros mian buŝon. Tiam mi komprenis, ke tiel mi povos suĉi mian sukon per TRE TREA pura tubeto. Fakte estas, ke en tiu grandega urbo estas haveno, ke multaj kamionoj venas al la haveno kaj forlasas ĝin, ke pluraj el tiuj kamionoj venas el Eŭropo, ĉar tie ili ne plu rajtas veturi pro eksaj filtroj, kiuj ne plu kontentigas la leĝojn.... Do la aero ne estas pura en urboparto ĉe havena. Se iu trinkas el boteleto, tiu persono remetas la kovrilon sur la botelo inter la glutadoj. Se iu preparas

tasojn aŭ glasojn, ĉiam tiuj iloj staras en malĝusta pozicio, kun malferma parto sube, kaj kovritaj per tuko. Tiel oni protektas ĉion, kio utilas al manĝado aŭ trinkado, kaj oni protektas ĉion, kion oni manĝos aŭ trinkos.






La soleco de la formiko

Kuba unuscena teatraĵeto por infanoj. Tradukis José de Jesús Campos Pacheco. Rolludantoj: formiketo, rano, grileto, strigo.

Parolanto troviĝas flanke de la scenejo: Ĉi tiu historio okazas en la arbaro, proksime de rivero, kie la formiketoj havas sian propran formikejon. La ĉefa rolludanto estas formiketo, kiu forkuras de sia domo.

Formiketo: Nun mi ekvivas sola. Do, mi bezonas neniun. Mi lacas labori kaj dispartigi ĉion kun miaj fratinetoj.

Parolanto: La formiketo trovas bulon da sukero.



Formiketo (kun mirego): Ho, kia granda bulo! Mi forportos kaj kaŝos ĝin en la supro de la monto. Tie neniuj prenos ĝin, kaj mi havos multe da manĝaĵo dum la vintro.

Parolanto: La formiketo penas treni la bulon. En tiu momento aperas rano.

Rano: Kiel, amiko formiko, ĉu vi ne povas ŝarĝi la bulon?

Formiketo: La ŝarĝo pezas tro, mi ne povas porti ĝin sola. Amiko rano, ĉu vi povas helpi min?

Rano: Ho ne! Tio ne estas afero por rano!



Formiketo: Ne gravas, mi trovos alian helpanton.

Parolanto: La formiko proksimiĝas al la domo de grileto, kiu loĝas en maljuna arbo.


Formiketo: Bonan tagon, amiko grileto! Ĉu vi deziras vojaĝi kun mi kaj helpi treni tiun bulon da sukero, kiu kuŝas ĉe la vojo kaj multe pezas?

Grilo: Ne, mi bedaŭras, mi devas fari mian ĉiutagan laboron.

Parolanto: La formiketo revenas al la bulo. Noktiĝas. Strigo proksimiĝas.

Strigo: Formiketo, mi rigardis ĉion. Kaj mi konsilos vin. Serĉu viajn fratinetojn, kaj vi ĉiuj kune povos facile treni la bulon.

Formiketo: Vi pravas, amiko strigo. Nun mi reiros al la formikejo. Tiel ni kune dispartigos la laboron kaj ĝian profiton. Mi neniam plu forkuros de miaj fratinetoj, kaj mi ne estos plu egoisto.



Desegnistoj: Danny D. PERERA, GUTIERREZ


A. WERB 2020.



Raita Pyhälä

Maria kaj ŝia mirinda helpohundo Violo

Kiam Maria plenkreskis, oni rimarkis, ke ŝi havas iun gravan malsanon. Ŝi povis subite perdi siajn fortojn, havi kramfojn¹ kaj dolorojn. Facile okazis elartikiĝoj ĉe ŝiaj manoj kaj piedoj.



Nun Violo kaj Maria loĝas kune kaj estas plej bonaj amikinoj. La hundo scias porti aĵojn, meti rubaĵojn en rubujon kaj (mal)fermi pordojn. Ĝi portas la rubaĵosakon al la rubejo de la domaro. Ĝi antaŭsentas, se Maria bezonas medikamenton kontraŭ doloro aŭ kramfo. Vespere ĝi malvestas ŝin kaj levas ŝiajn gambojn en la liton, kovras ŝin per la varma kovrilo. Dum la nokto ĝi dormas surplanke, proksime. Matene ĝi helpas Marian vestiĝi. Ĝi scias (mal)fermi zipojn, de kiuj pendas ŝnuretoj, por plifaciligi ĝian laboron. Maria diras, ke Violo estas ne nur ŝia plej bona amikino, sed ke Violo elkonas ŝiajn pensojn kaj dezirojn.

Sur ŝi la helbruna Violo portas blublankan veŝton, kiu pruvas, ke ĝi estas speciala helpohundo, kiun homoj ne tuŝu. Ĝi atentigas nur sian mastrinon. Oni ne karesu ĝin aŭ parolu al ĝi. Kelkfoje ĝi maltrankviliĝas surstrate, kiam ĝi eksentas doloron de preterpasanto. Kiam Maria kaj ĝi vizitis ŝian patrinojn, ĝi metis sian kapon sur lokon, kie la patrino havas kanceron.

Noto de Raita: En miaurba gazeto *Aamuposti Viikko* mi legis tiun ĉi novaĵon pri la mirinda helpohundo, kies finna nomo estas Orvokki. Tio signifas Violon. Laŭ la novaĵo mi verkis tiun ĉi artikoleon por *Juna Amiko*. Ĝi aperis 20.1.2021 kaj venis senpage al ĉiuj loĝantoj de mia urbo Hyvinkää. La nomo de la raportanto estas Mia Lagström. Min mem tiu ĉi artikolo kortuŝis kaj mirigis.

P.S. Nun ĉe la flughaveno de Helsinko laboras helpohundoj, kiujn oni trejnigas rekoni, se iu vojaĝanto portas la koronaviruson kun si. Vojaĝanto povas peti, ke tiu hundo testu lin, sed ankaŭ flegistinoj testas la vojaĝantojn.



1) Kramfo: muskola doloro aŭ spasmio.

Pandemia puzzle

La rubrikon

prizorgas:

Stefan MacGill



Ankaŭ en la nova jaro la pandemio influos kaj limigos nin. Sed feliĉe, kelkaj solvoj aperas sur la horizonto kaj estas akireblaj en multaj dekoj da landoj. Jen krucvortenigmo pri nia nuna sorto.

Horizontale →

1. La enhavo de injekcio, kiu protektas nin kontraŭ la pandemio (7).
8. Grupa protekto, kiu venos por injektado de 70% ĝis 80% de la popolo (7).
9. Maloftas. Dufoja trafo de la malsano _____, sed ja eblas (5)
10. Japana versoformo, kun ripetado de kvin- kaj sep-silabaj versoj (3 R)
12. Granda insulo en Italio kun fama vulkano (7)
16. La japana arto de paperfaldado (7)
17. Iom longa kaj detala noto pri iu temo, ekzemple biografio _____. (6)



Vertikale ↓

1. Pro la nuna plago necesas privenki la _____ kun la nomo 'Kovid 19' (7).
 2. Celado al iu dezirata (4, 3)
 3. Homo, kiu estis resanigita (7 R)
 4. Centra Nacia Asocio (mallongigo 3)
 5. Apartenanta al iu (3)
 6. Nova Centavo (mallongigo 2)
 7. Gajna linio en populara surpapera ludo por infanoj (3)
 11. Granda estas la _____ pro la risko malsaniĝi pro la pandemio (4).
 13. Portado de masko ne povas _____ vin plene sekura, sed ĝi certe helpas. (3)
 14. Senenergieco. Unu el la simptomoj de la malsaniĝo estas sento de granda _____eco. (3 R)
 15. Oficiala Ordo (mallongigo 2)
- (R) = uzu nur la radikon.

1	2	3	4	5	6	7
8						
9						
10					11	
12			13	14		15
16						
17						



Tiu infana ludo, serĉata en 7 vertikale, nomiĝas en la angla 'nuloj kaj iksoj' aŭ 'tic-tak-toe'. Ĉu vi konas ĝin en via lando? Kiu estas ĝia nomo ĉe vi? Skribu al *Juna Amiko* por la tutmonda esploro.



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaidd Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugallio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.officejo@gmail.com*.

La 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021

Jam la naŭan fojon ni kantos en la lingvo Esperanto!

Ni jam komencis preparadon de la 9-a eŭropa festivalo de esperantaj kantoj. Ni kore dankas al niaj honoraj patronoj kaj atendas pozitivajn respondojn de la aliaj... ☺

La festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj. Ĉiu partoprenonto alsendu jam de la 15-a de februaro sian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto – ĝis la 15-a de aŭgusto.

Se eĉ dum la pandemio oni povos prepari surloke konkursan provaŭdon, tiam ni informos, kie tio okazos. Tamen la publiko aljuĝos sian premion, la Publik-premion, nur al video-kantoj. Kiamaniere oni povas fari tion, ni ankoraŭ informos.

La festivalo okazos en 2021 hibride (surloke kaj rete, aŭ nur rete, pro la pandemio). Ĝis la 15-a de aŭgusto okazos konkursa prov-aŭdo de partoprenantoj.

La 12-an de septembro okazos Koncerto de Premiitoj, rete.

La Festivalo ĉi-jare okazos en tri kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo,
2. solisto.
3. registrita en studio.

Honoran patronecon pri la festivalo jam akceptis Bohdan Aniszczyk – la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo (de urbo Vroclavo) kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Eurokka (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo), *Juna Amiko* (la plej konata kaj ŝatata revuo de Esperantujo) kaj *Varsovia Vento* (interreta radio)..

La organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej) invitas ĉiujn partopreni en la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Bonvolu sendi vian aliĝilon kaj filmeton ĝis la 15-a de aŭgusto 2021 – atendas vin multaj belegaj premioj!

Unu el la premioj fondis EUROKKA – estas 3 premioj – jarabonoj al ABONKLUBO (aliro al la kompleta katalogo de Vinikosmo, al katalogoj de 75 000 aliaj sendependaj eldonejoj kun 400 000 artistoj kaj 7 milionoj da titoloj).

Ĉiuj informoj estas riceveblaj ĉe la interreta adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: “E-kanto”), aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640, kaj en la retejo www.ecem.com.pl

La organiza teamo de Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej



ilei

